

EL POPOLA ĈINIO

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Ū-19034/Esp.
2000

中國新道

3

2000



Diskuto pri virinoj

**Por ke ĉiuj estu foraj
de malriĉeco**

EL POPOLA ĈINIO



Ilia vivo
ŝanĝiĝis **21**



La mondo
en la
manoj de
junuloj **42**




Kolektantino
de ludiloj **44**

Urbeto sur
lago **24**



34
Ĉemara
urbo
Dalian



- 3 **INTER NI**
 4 Diskuto pri virinoj
 7 **KURANTAJ AFEROJ**
 8 **50 JAROJ — EPĈ:**
 Mia vojo al Esperantujo; Esperanto-Paco-Ĉinio
 9 **KORESPONDI DEZIRAS**
 10 **ORIGINALE VERKITAJ:**
 Interkomprenemo
 11 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**
 Ŝatataj dombestoj en Ĉinio
 12 **POR KOMENCANTOJ:**
 La masto de la novjaro (Vjetnama fabelo)
 13 **ESP-NOVAĴOJ**
 14 Raporto pri la vojaĝo en Ĉinio
 16 Chen Chuhua kaj lia hejma muzeo de tuĝja-a kulturo
 20 Danzeng kaj lia gastejo
 28 **POR VIA SANO:**
 Kiel maljunuloj tenu junecon de sia cerbo?
 29 **NUNTEMPA BELARTO:**
 Sentimentalaj belulinoj
 32 Por ke ĉiuj estu foraj de malriĉeco
 37 **ORDINARAJ ĈINOJ:**
 Lastaj fekportistoj
 40 Brilinta verda stelo
 46 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
 48 Interesaj fenomenoj en ĉinaj dialektoj
 50 **SUR NIA LIBROBRETO:**
 Lotus-lanterno
 51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**
 Unuiĝo de ĉinaj nacioj

INTER NI

Unu el la temoj de ĉi tiu numero estas virinoj. Tio estas eterna temo, kaj en unu sola artikolo oni ne povas multe pritrakti kaj nur iom koncernis la problemon pri enoficiĝo kaj mastrumado de la virinoj. Viaj leteroj estos bonvenaj, se vi volas informiĝi pli multe pri la ĉinaj virinoj. La ĉina kulturo, kiu, ni pensas, multe interesas vin, estas kreita de la diversaj nacioj de Ĉinio. En ĉi tiu numero ni konigas la historion, morojn, gastronomion, vestojn kaj arkitekturon de nacimalplimultoj de Ĉinio. Tio pruvas, ke ĉiuj nacioj havas sian tradician historion kaj brilan kulturon, malgraŭ ke ili havas ĉu grandan aŭ malgrandan loĝantaron, ĉu longan aŭ mallongan historion, ĉu sian propran skriblingvon aŭ ne. Do, "Chen Chuhua kaj lia hejma muzeo de tuĝja-a kulturo" konigas al niaj legantoj la kolorriĉan kulturon de tuĝja-oj, kiuj ne havas sian skriblingvon. En ĉi tiu numero vi legos "Interesaj fenomenoj en ĉinaj dialektoj", unu el la serio pri la ĉina lingvo de grandaĝa samideano Zhang Qicheng. Lia kontinua kontribuo montras lian konsekvencon amon al vi. De ĉi tiu numero ni aperigos kontribuojn por la 50-jariĝo de EPĈ. Kun kora danko ni atendas vian legadon.

La Red.



De vendistino al vicdirektorino
 Foto de Zhang Guojun

Post trejnado la 39-jara senlaborulino Xu Guozhen (dekstre) ek-laboris en superbazaro de la urbo Fuzhou. Dank' al siaj penado kaj studado pri administrado ŝi fariĝis el ordinara vendistino vic-direktorino de la superbazaro kaj modela laborulo de Fuzhou. Jen ŝi kun sia kolego.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
 Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu
 Adreso: P.O. Kesto 77,
 Beijing 100037, Ĉinio
 Telefono kaj telefakso:
 +86-10-6832 1808

Retpoŝto:
 epc@china-report.com

Hejmpaĝo:
 <<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

3[498]2000

Diskuto pri virinoj

Lastatempe la redakcio de EPĈ faris enketon en kaj ekster la redakcio pri la virina problemo rilate geedzecon, profesion, infanon k.a. La demanditoj plejparte estas alte klerigitaj, kio limigis la enketon, tamen iliaj respondoj plenaj de karakterizaĵoj parte konigas al vi la staton kaj pensojn de la ĉinaj virinoj.

de XIANG HONG

I. Ĉu virinoj devas esti profesiuloj?

Tan Xiuzhu (profesia esperantistino): Mi ŝatas esti profesiulo. Profesia laboro pruvas miajn valoron, kapablon kaj inteligentecon. Kaj dank' al profesia laboro mi povas pli multe kontakti la mondon ekster la hejmo kaj havi vastan vidkampon. Sed oni ne devas fari ekskluzivan respondon al tiu demando, ĉu virinoj devas labori ekstere aŭ resti hejme. En la socio regata de grandvirismo (laŭ tiu vidpunkto, la virinoj devas absolute obei la virojn), la virinoj eniru en la socion kaj fariĝu profesiuloj, tio estas tre grava por emancipo de la virinoj kaj efektiviĝo de egalrajteco de la viroj kaj virinoj. Sed en iuj familioj maljunuloj aŭ infanoj bezonas flegantojn, kaj tiam estas ankaŭ necese por virinoj resti hejme por prizorgi ilin.

Zhang Qingzhen (redaktorino): Mi preferas stabilan profesion. Mi ŝatas memstarecon en la familia financo. Profesia laboro riĉigas mian vivon. Vera efektiviĝo



de egalrajteco de viro kaj virino dependas de enoficiĝo de virino.

Mei Ping (senlaborulino): Antaŭ kelke da jaroj nia fabriko falis en depresion kaj mi devis labori en alia loko. Sed mia edzo timis, ke mi malvitiĝos en tia loko, kaj devigis min forlasi la laboron. Sed laŭ mi, en tiu duonjaro mi multe spertis kaj ĉiam troviĝis en bona humoro. En la unuaj du monatoj, post kiam mi fariĝis senlaborulino, mi estis ĉagrenita de enuo. Sed iom post iom kvietiĝis mia koro. Kelkaj el miaj bonaj kamaradinoj troviĝas en la sama situacio. Nun mi ankoraŭ volas havi profesion. Mi, malpli-ol-40-jara, ĉiam sentas enuon senfare hejme.

Wang Lihua (tradukistino): Absolute mi ne elektas la vivmanieron rifuzi profesion kaj resti hejme. Mi perdus mian sendependecon kaj memrespekton, se mi vivtenus min per alies enspezo. Mi preferas morti ol senfare resti hejme.



Pang Naiying (redaktorino): Konkurencio por ekzisto estas tre kruela, kaj la virinoj nepre devas havi profesion, alie ili estos elkribigitaj. Sed la virinoj devios,

se ili tute fandiĝos en la socion. Ankaŭ tion mi ne volas vidi.

Wang Hanping (redaktoro): Mi opinias, ke la virinoj devas eliri el la hejmo kaj trovi sian ŝatatan profesion. Resti hejme ne konformas al la socia evoluo nek povas doni al la virinoj la ŝancon ĝui la buntan mondon. Kaj krome tio ne helpas harmoniigi la familian vivon.

Ge You (filma stelulo):

Mi preferas, ke la virinoj restu hejme. Post taga laboro, la viroj estas lacaj kaj volas vidi, ke la edzino jam estas hejme. Mi ne ŝatas virinon tre alte klerigitan kaj tre saĝan. La vivo ne dependas de tio. Ŝajnas al mi, ke en la nova jarcento ne tuj ŝanĝiĝos la stato, ke la viroj perlaboras ekstere kaj la virinoj mastrumas hejme.

Dou'er (dungitino en kompanio): Ĉiu mia tago estis pasigita en okupiteco kaj streĉiteco. Multaj virinoj 35-40-jaraj kiel mi sentas tro peza la ŝarĝon. Mi ne scias, por kio ni tiel intense laboras. Kiam mi vidas, ke malordo regas en la hejmo kaj malbone lernas la infano en la lernejo, mi



senenergiigās kaj volas retiriĝi. La virinoj revenu en sian hejmon, tie estas ilia spirita edeno. Portempe tio estas nerealigebla, sed tio estos ebla iun tagon en la estonteco. Tion mi kredas.

Yu Tao (profesia esperantisto): Moderna virino devas esti ampleksa. “Eliri el la hejmo” aŭ “resti hejme” estas forte karakterizitaj per la tradicia ĉina gusto. Laŭ mia observado, multe da virinoj sentas premon, kaj ili fakte ne volas esti profesiuloj. Ili profesie laboras nur pro la financa bezono, ilia laboro estas enuiga, la vivo laciga. Ne fari profesian laboron ne aludas ekskluzivan mastrumadon. Ili povas eduki la infanon kaj fari ion ŝatatan.

Resumo de Xiang Hong: *Eble ĉi tiu diskuto restos senrezulta. Pro la malsameco de la sekso kaj la socia pozicio homoj havas malsamajn opiniojn. Mi pensas, ke al la demando, ĉu virinoj restu hejme aŭ havu profesian laboron, la plej bona respondo estas, ke ili havu la rajton kaj liberon de elekto. Iu verkistino diris: Bone estos, se iu virino volas esti nur patrino kaj la socio permesas al ŝi fariĝi taŭga patrino; malbone estos, se oni devigas ŝin sendi la infanon en infanĝardenon kaj havi profesian laboron.*

II. Kiu zorgas mastrumadon? Kiu decidas la elspezadon en la hejmo?

Tan Xiuzhu: Mi kaj mia edzo kune zorgas mastrumadon kaj kune decidas la elspezon. Ni metas niajn salajrojn ie kaj ambaŭ povas preni tie monon. Sed ofte mi faras decidon en elspezado pro plena konfido de mia edzo.

Su Yijun (sekretariino): Mia edzo preparas manĝaĵojn kaj mi lavas vestojn kaj purigas la ĉambrojn. Kiu el ni estas libera, tiu iras repreni la infanon de la

infanĝardeno. Foje-foje mi grumblis kontraŭ la laciga mastrumado, sed kiam la edzo aŭ la fileto prezentis al mi tason da varma teo kaj komplimente diris dankon, tuj forvaporiĝis mia plendo. Ni tenas respektive la enspezon, kaj decido por grandsuma elspezo estas farita post interkonsiliĝo.

Wang Hanping: Mi opinias, ke ambaŭ edzo kaj edzino devas meminciate fari mastrumadon kaj ne necesas labordivido. Mi faras mastrumadon laŭ tiu principo, sed mia edzino agas alie (ŝi ofte pretekstas laciĝon). Iom post iom mi plenumas pli kaj pli grandan parton de la mastrumado. Ni kune tenas la monon kaj interkonsiliĝas pri elspezo. Tio helpas al racia aranĝo de spezado kaj montras interespekton.

Zhang Qingzhen: Mi zorgas aĉeton de legomoj, preparon de manĝaĵoj, lavadon de vestoj kaj edukon de la filo. Mi kaj la edzo kune purigas la ĉambrojn. La kuireja laboro ŝajnas al mi tre ĉagrena kaj vekas en mi grumblon. En la hejmo mi decidas grandan elspezadon.

Wang Lihua: Malgraŭ ke mi malŝatas mastrumadon, mi akompanas la infanon al la lernejo kaj returne kaj prenas sur min la lavadon de vestoj. Mi tenas la monon, sed kutime mi ne faras decidon en elspezado.

Yu Tao: Mia edzino malkontentas kontraŭ mi ĝuste pro tio, ke mi malmulte zorgas pri mastrumado. Fakte ĉiuj vivas sub la duobla premo de laboro kaj familio, ŝajne tio estas ĝenerala fenomeno en disvolviĝantaj landoj.



Xiao Li (senlaborulino, diplomito de altlernejo): Mi ne ŝatas fari mastrumadon, kaj la edzo estas tre okupita, tial ni havas servistinojn por zorgi pri la infano. Tio solvis la konfliktojn pro mastrumado. Antaŭe mi multe gajnis monon kaj estis libera en konsumado. Sed poste mi malgajnis la tutan monon de la familio en negocado de akcio. Nun mi eĉ ne havas monon por vojaĝi al la hejmloko por viziti mian patrinon. Mia edzo estas tre malkontenta kontraŭ mi.

Pang Naiying: Ni faras mastrumadon laŭ divido. Mia edzo preparas manĝaĵojn kaj mi purigas la ĉambrojn. Ni lavas respektivajn vestojn. Mi prenas mastrumadon por malstreĉi mian kapon post laciga menslaboro. Mi estas libera en aĉetado kaj mi decidas pri la elspezo de granda sumo. Fakte mi ne volas zorgi pri tio, sed mia edzo malpli ol mi.

Mei Ping: Mia edzo estas volonta en mastrumado. Sed nun mi ne havas laboron kaj estas maldece, ke mi nenion faras hejme. Mi pasigas horojn per mastrumado. Mi ne emas teni monon, sed mia edzo agas male. Mi devas peti de li monon, se mi volas ludi maĝangon aŭ distriĝi en balejo.

Resumo de Xiang Hong: *Oni povas diri, ke profesiulinoj havas relative altan pozicion en la familio, kaj pro tio ili multe lacas. En la estonteco, kune kun la evoluo de la servado de la socio, mastrumado povos esti plenumata de servokompanio. Oni povos mendi manĝaĵojn kaj dungi horpagan serviston por mastrumado, kio povos liberigi la virinojn el mastrumado.*



III. Kiom gravas la infano en la familio? Kiel vi opinias pri infanrifuzaj familioj?

Su Yijun: Infano estas ligilo de la geedzoj. Mi profunde ekkomprenis la vorton post nasko de la infano.

Liu Caisheng (tradukisto): Mia filo estas la centro de mia familio. Se mi havus duan vivon, mi preferus ne havi infanon. Bona estas infanrifuzaj familioj.

Tan Xiuzhu: Mia filo ludas gravan rolon en mia vivo. Li ĉagrenas, zorgigas kaj lacigas min, sed pro li mi ankaŭ sentas feliĉon. Li estas mia espero kaj konsolo. Se mi refoje farus elekton, mi ankoraŭ preferus infanon, sed ne multe. Oni havu rajton libere elekti vivmanieron havi infanon aŭ ne.

Zhang Jicang (ĵurnalisto): Mia nuna vivo estas kontentiga, kaj mi ne havas sufiĉe da kondiĉoj havi infanon. Mia edzino tre volas infanon, sed ŝi respektas mian decidon, kaj mi estas tre danka al ŝi.

Zhang Qingzhen: Mi sentas, ke pro mia infano mi fariĝis kompleta virino. Sed eble mi ne volus infanon, se mi povus fari novan elekton. Laŭ mi bona estas infanrifuzaj familioj. Antaŭe oni diris, ke "havi filon por sia vivtenado en la maljuneco". Sed nun, pli kaj pli boniĝas la socia asekuro, kaj la maljunuloj ne bezonas maltrankviliĝi pri sia vivo. Seninfaneco estas preferinda.

Pang Naiying: Eble en la maljuneco de siaj gepatroj infanoj fariĝas apogo. Sed mi devus bone konsideri la situacion de la socio, se mi havus la ŝancon refoje decidi pri infano. Se mi ankoraŭ vivus sub peza premo kiel nun kaj ne havus sufiĉan rimedon doni al la infano plej bonan edukadon, mi preferus ne havi infanon. Mi aprobas infanrifuzan

familion. Almenaŭ ĝi ne pezigos la ŝarĝon de la terglobo.

Yu Tao: Se vi ion kreis por la mondo, tio estis via infano. Kio estas pli signifa ol krei vivon? Sed infanrifuzaj familioj estas ideala elekto, se oni ne ŝatas infanon.

Wang Lihua: Infano estas suno, aero kaj akvo en mia vivo. Li estas la forto por subteni mian vivon kaj espero en mia estonteco. Mi opinias, ke infanrifuzaj familioj ofte estas nestabila.

Wang Hanping: Flegi kaj eduki infanon estas plezuro en la vivo. Oni almenaŭ devas havi unu infanon. Mi ne malaprobas infanrifuzan familion, sed mi ne volas vidi, ke ĝi estos ĝenerala fenomeno de la socio.

Resumo de Xiang Hong: *Tute estas ekster mia atendo, ke la procentoj de la demandoj, kiuj rifuzas infanon en la dua vivo, estas tiel altaj. Eble oni povus atribui tion al la malfacilo flegi kaj eduki infanon. Pli kaj pli multiĝas la familioj rifuzantaj infanon, sed por urbaj maljunuloj kaj kamparanoj, rifuzi infanon estas ekster ilia kompreno.*

IV. Kiu el la viroj kaj virino sentas pli grandan premon? Ĉu la reala vivo estas via dezirata vivo?

Ge You: Mi preferas esti virino. Virino ricevas vivtenajn rimedojn post edziniĝo kaj vivos multe pli komforte ol viro. Sed kiom da malfaciloj atendas virojn!

Zhang Qingzhen: Mi opinias, ke virinoj sentas pli grandan premon ol viroj. Sed oni diras, ke "feliĉa estas kontentiĝemulo". Mi kontentas pri mia vivo. Se mi havus duan vivon, mi preferus ankoraŭ esti virino, virino kun bela aspekto kaj

rafinita gusto.

Wang Hanping: Evidente viro sentas pli grandan premon. Mi opinias, ke mia nuna vivo ne estas ideala. Sed malgraŭ tio mi devas solide daŭrigi la vivon.

Pang Naiying: Mi opinias, ke la viroj kaj virinoj suferas de sama premo. Premo en mia vivo venas ĉefe de la profesia laboro, kaj ankaŭ de la kaŝita maltrankviliĝo pro la malalta enspezo kaj la pli kaj pli alta elspezo por domluado, kuraco k.s. Sendube la nuna vivo ne estas ideala. Mi ne deziras duan vivon, se la medio de la vivo restos senŝanĝa kiel la nuna.

Yu Tao: Viro eltenas pli grandan premon. Unu el miaj devizoj estas "estu kontenta kaj rimarku malkontentaĵojn", kaj nun mi vivas en tia stato.

Wang Lihua: Vivi estas malfacile kaj vivi kiel virino — pli malfacile. Virinoj sentas pli grandan premon ol viroj. Mia nuna vivo certe ne estas dezirata. Se mi havus duan vivon, mi preferus esti birdo libere fluganta en la naturo.

Liu Caisheng: Premo sur la viroj estas pli granda, ĉar ili portas pli da devoj. Mi ne estas kontenta pri mia vivo, sed mi ankoraŭ preferas esti viro en la dua vivo.



Tan Xiuzhu: Ĝenerale virinoj suferas pli grandan premon ol viroj. Mi ne tre kontentas pri mia vivo. Se estus la dua vivo, mi ankoraŭ preferus esti virino, ĉar virino estas bela, delikata kaj amata.

Resumo de Xiang Hong: *La viroj diris, ke ilia vivo estas malfacila, dum la virinoj plendis, ke ili suferas pli grandan premon ol la viroj; sed neniu volas ŝanĝi sian sekson. Kiu iluminos min? ■*



La 6-an de decembro 1999 inaŭguriĝis la fervojo inter Urumqi kaj Kashi.

● En 1999 la nacia ekonomio de Ĉinio kreskis je 7.1% kaj la eksportado haltigis la malpliigon aperintan aŭguste de 1998, kaj komencis kreski monaton post monato.

● Pro politikaj kaj geografiaj kaŭzoj la ekonomio en la okcidenta parto de Ĉinio kreskis relative malrapide, kaj sekve de tio okazis malekvilibro de la ekonomia disvolviĝo inter la orienta kaj okcidenta partoj de la lando. La okcidenta parto estas vasta kaj abunda je naturaj riĉfontoj. Ĝi povas esti grava bazo de energioj kaj aliaj riĉfontoj kaj ankaŭ latentia merkato por konsumantoj, kiu liveros multajn ŝancojn por investado. La ĉina registaro refoje publikigis la strategian principon akceli ekspluaton en la okcidenta parto kaj tie faros grandan konstruon kun trafiko kaj hidroenergio kiel la grava punkto.

● Jam en 1993 la ĉinaj tekstilaj entreprenoj falis en dilemon kaj eksuferis deficiton en sinsekvaj 3 jaroj. De 1996 ili malpliigis la nombrojn de spindeloj kaj laboristoj respektive je 10 milionoj kaj 1.2 milionoj, dank' al kio la tekstilaj entreprenoj nuligis deficiton kaj en la unuaj 11 monatoj de 1999 ili akiris profiton de 116 milionoj da juanoj. Tio estis ilia unuafoja

profito post sinsekvaj deficitoj.

● Proksime de Baicheng de Xinjiang en la okcidenta parto de Ĉinio oni trovis olegaskampon. La prospektorado montras, ke ĝia gasa rezervokvanto estas 200 miliardoj da kubmetroj. Ĝi estas la plej granda olegaskampo ĝis nun trovita en Ĉinio.

● Ĉinio sukcese faris vaporan turbinon kun totala kapacito de miliono da kilovattoj por nuklea elektrejo.

● La Ŝanhaja Medicina Genetika Instituto, kiu la unua elkulturis en Ĉinio bovon kaj kapron kun mutacio, antaŭ nelonge sukcese faris ekspertizon pri sekso de tubobovo kaj tubokapro kaj posedas la novan teknikon pri embria transplantado. Dank' al tio oni ne nur solvis la mankon de embrioj, sed ankaŭ plureble levis la animalan produktivecon pere de kontrolo de la animala sekso.

● En 2000 Ĉinio komencis reformi la ekzamenan sistemon por universitatoj, t.e. en iuj urboj oni okazigas ankaŭ en printempo ekzamenon por akcepti pli da novaj studentoj, sed antaŭe oni akceptis novajn studentojn sole en somero.

● En 1999 en Ĉinio 98.9% de la knabinoj povis lerni en elementa lernejo, sed en 1949

nur 15%. En la lastaj 10 jaroj Ĉinio publikigis serion da leĝoj kaj difinoj pri edukado, por ke la knabinoj havu la rajton de edukiĝo samkiel la knaboj.

● Resaniĝis iu 36-jara malsanulo, kiun minacis de 3 jaroj morto pro hepata cirozo kaj rena insuficienco, post kuna transplantado de reno kaj hepato en la Zhejiang-a Medicina Universitato.

Antaŭ tio alia 28-jara viro resaniĝis per tia kuracado. Ili estas la solaj homoj en Ĉinio, kiuj daŭre vivas post tia operacio.

● En Yuanmou, Yunnan-provinco en la sudokcidenta parto de Ĉinio, ĉinaj arkeologoj trovis malsupran dekstran makzelon de antropoido, laŭ kies kurbiĝo oni povas konfirmi la evoluadon de la antropoidoj. Tio estis grava arkeologia eltrovo en la pasintaj pli ol 10 jaroj en la koncerna sfero. Ĝi havas gravan signifon ankaŭ en esploro pri la klimata, ekologia kaj geografia medioj en la epoko de antropoidoj kaj la rilatoj de la fruperiodaj homoj kun la bestoj.

Yunnan-povincio havas abundajn riĉfontojn de fosilioj de antropoidoj kaj paleoantropoj. Yuanmou-homoj malkovritaj en la 60-aj jaroj de la 20-a jc. estas rigardataj kiel unu el la plej fruaj homoj en Ĉinio kaj eĉ en Azio. Ili vivis antaŭ 4-6 milionoj da jaroj.

● Antaŭvespere de la jaro 2000 naskiĝis nova Guinness-rekordo en la Pekina Studenta Sporthalo: la 2.5 milionoj da domenoj, starigitaj de 50 ĉinaj kaj japanaj mezlerneĵanoj, estis sukcese faligitaj per unu tiro. La antaŭa rekordo farita de nederlandanoj estis 2.47 milionoj da domenoj. La domenoj de la nova rekordo formis 37 belajn bildojn, inkl. la bildon "2000", ĉinajn kaj japanajn popolajn pentraĵojn kaj pentraĵojn de Vincent van Gogh kaj Pablo Picasso.

Mia vojo al Esperantujo

- Esperanto, aventuro de mia vivo
- EPĈ ravis min ĉefe per artikoloj kaj fotoj pri la ĉina kulturo kaj vivo

de LENKE SZASZ (Rumanio)

PASIS 50 jaroj ekde la fondiĝo de “El Popola Ĉinio”. Pasis 110 jaroj ekde la naskiĝo de la lingvo Esperanto. Ĝia kreinto, d-ro Zamenhof estus feliĉa vidante, ke en la plurmiljara Ĉinio ekĝermis kaj nun floras ĝi, kiun li semis en 1887.

Jen mi legis: “La lernado de lingvoj devas esti unu el la grandaj aventuroj de la vivo.” Mia modesta vivo de instruistino ne estis riĉa je eksteraj aventuroj. Tamen riĉa ĝi fariĝis interne dank’ al Esperanto. Esperanto riĉigis mian vivon, ĝi fariĝis aventuro de mia vivo.

En la vilaĝo, kie mi naskiĝis, ne estis elektro dum miaj infanaj jaroj, kompreneble nek televido kaj radio. Mia plej amata ŝatokupo estis legado. Tiutempe estis malmultaj libroj en la vilaĝo. Mi ĝojis, se mi trovis legaĵon. Mi legadis ĝis kiam permesis la lasta lumo de la vespera krepusko. Vintre la tagoj estas malpli longaj, frue vesperiĝas. Mi legis apud la forno, ĉe la pordeto malfermita kaj ĉe la flamo de la brulanta ligno. Baldaŭ mi komencis mem skribi fabelojn por mia propra plezuro, poste miaj amikinoj aĉetis kajerojn, por ke mi skribu por ili fabelojn.

Foje mi verkis eĉ “ĉinan” fabelon kun jasmeno- kaj lotusofloroj, sen scii kiel ili aspektas. Ili simbolis por mi la ekzotikan belecon, kiu eĉ nun min allogas al la revuo EPĈ.

Mi fariĝis instruistino pri lingvo kaj literaturo. En la 80-aj jaroj la vivo fariĝis pli kaj pli malfacila en Rumanio. Oni malofte trovis nutraĵojn en la vendejoj. Sukero, oleo, viando fariĝis raraĵoj. La elsendo de la

nacia televido reduktiĝis je 2 horoj tage, eĉ dum tia mallonga elsendo oni devis spekti ĉefe geedzojn Ceausescu. La gazetoj estis plenaj de iliaj fotoj kaj paroladoj. Dum tiu mizera epoko mi konatiĝis hazarde kun Esperanto, en 1982. Mi legis en gazeto pri komenciĝanta E-kurso en malproksima urbo. Tuj mi skribis al la nekonata kursgvidanto, petante materialon. Mi ricevis malnovan broŝuron kaj komencis lerni la lingvon. Ĝiaj vortoj jam estis parte konataj el aliaj fremdaj lingvoj kaj mi lernis kun entuziasmo. En 1985 la instruado de Esperanto estis malpermesita. Estis malpermesitaj ankaŭ diskuto kun eksterlandano kaj gastigo de eksterlandano. En miaj leteroj mi zorge evitis skribi pri la reala vivo en Rumanio. Verŝajne oni kontrolis la leterojn al kaj el eksterlando. Mi ricevis foje-foje librojn, revuojn de miaj korespond-amikoj kaj ekkonis “El Popola Ĉinio”. Ĝi ravis min ĉefe per la fotoj pri antikvaj artaĵoj, skulptaĵoj, ĉinstilaj pentraĵoj ktp. Mi tre ŝatas la artikolojn pri la ĉina kulturo, literaturo, pri la ĉiutaga vivo de la ĉinoj.

Foje en “El Popola Ĉinio” mi trovis poemeton de Ŝje Lingjun (385-433), “Jarfino”, kaj tradukis ĝin hungaren (mia gepatra lingvo). En 1997 ĝi aperis en gazeto. Bedaŭrinde, jam de jaroj ĉi tie ne estas abonebla “El Popola Ĉinio”. Tamen de unu jaro mi denove legas ĝin dank’ al slovena korespondantino, kiu abonigis al ĝi mian amikino; ŝi pruntedonas ĝin al mi. En la oktobra numero mi trovis la belegan foton “Taoisto sur Floro”. Tiun bildon mi montris al miaj gelernantoj en la lernejo. Mi atentigis ilin observi la mienon



La aŭtoro

de la leganta homo kaj diris: “Jen, antaŭ sescent jaroj la ĉinoj ĝuis kaj alte aprezis la libron! Ja vi scias, ke ili inventis ankaŭ la paperon.” Poste mi kopiis la bildon kaj nun ĝi estas pendigita en la lerneja biblioteko.

En 1990 mi la unuan fojon havis la okazon doni ekzamenon kaj akiri atestilon pri lingvoscio. En 1991 mi akiris atestilon dum mezgrada ILEI-ekzameno. Mi instruis Esperanton al gelernantoj, al gejunuloj kaj laste al malgranda grupo, en kiu estis lernantino kaj pensiulino. La ekonomio de mia lando estas en transira periodo. Kreskas la nombro de la senlaboruloj, senĉese kreskas la prezoj kaj tio estas malfavora ankaŭ al korespondado. La poŝtmarko por eksterlando multekostas, vojaĝi eksterlanden multekostas, estas malfacile akiri vizon ktp. Tamen la malfacilaĵoj ne povas malhelpi la esperantistaron. Estas ne tro multnombraj sed fidindaj grupoj, kiuj aktivadas dise en la lando kaj restas fidelaj “civitanoj” de Esperantujo.

Mi estas unu el ili. ■

Esperanto-Paco-Ĉinio

Subtenu EPĈ per abono kaj la E-Sekcion de ĈRI per oftaj leteroj

de GEORGO OTTO VASKE
(Brazilo)

LA venko de ĉinaj subpremitoj okazis antaŭ 50 jaroj, kune kun la venko kontraŭ invademaj potenclandoj. Brave, ĉinoj! Tra la tuta mondo bonkoraj homoj kunfestas la starigon de la mejloŝtono 50-jaroj de libero, ke ĝi estu apenaŭ dekono de brila estonteco!

La mondo gapas. En 50 jaroj Ĉinio prosperis pli ol sudamerikaj landoj dum 500 jaroj. Oni des pli admiras la faron, ĉar tiutempe eble 90% de la popoloj sciis legi kaj vivis humile kiel parioj. Pere de la magazino "El Popola Ĉinio" la homaro konatiĝis kun la ekstreme humiligaj kondiĉoj, en kiuj la ĉinoj estis tenataj de sialandaj regantaj riĉuloj kaj eksterlandaj potenculoj. Detalo, kiu plej ŝokis leganton, estis la hontinda fakto ke dise ĉe strando

estis starigitaj avertoj: MALPERMESATA POR ĈINOJ KAJ HUNDOJ.

Brava kaj persista eltenemo venkis multe pli fortajn armeojn ol kapablis arigi la rezistemaj kaj kontraŭbatalantaj komandantoj. Sangon, vivojn kaj amarajn larmojn kostis la liberiĝo. Tiu estis la prezo. Justaj eksterlandanoj apogis la ĉinan liberigan militon. Tiel okazis kun la japanino Verda Majo, kiu spertis ĉirkaŭe la kruelajn agresojn kaj havis la privilegion diskonigi al la tuta mondo, kiel radioparolistino, la okazantajn faktojn sur la batalkampoj.

Ĉinio libera kaj suverena montras al la mondo, kiom eblas progresi, se ĉiu civitano rajtas esperi rekompencan por sia laboro. Modestaj, la ĉinoj sin diras postiĝintaj sed, en preskaŭ ĉiuj kampoj de aktiveco ili staras inter la plej progresintaj. Eĉ modernan nuklean teknikon ili regas. La giganto Ĉinio vekigis.

Tion timetis potencaj landoj jam pli ol 30 jarojn antaŭe. Nuntempe ĉi tiuj landoj, envidemaj, vane faras ĉion eblan, per la preso, en fotoj kaj tekstoj, deprenante iom el la brilo de ĉiuj konkeroj en la kampoj de tekniko, arto, medicino ktp., kvazaŭ nekapitalista reĝimo ne indas stari samnivele inter kapitalistaj potenculoj.

Samideanoj tra la tuta mondo, konsciiĝu ke el ĉinoj konsistas ĉ. unu kvinono de la homaro, ke tie la homoj, ne infektitaj de fremdaj lingvoj kiel en la Okcidento, volonte lernas Esperanton, ke Ĉinio iam havos pezon antaŭen puŝi la neŭtralan lingvon ĝis ĝi havos facilan kurson en diplomaciaj rilatoj. Tial ĉiu homo kapabla legi en Esperanto sentu sin devigata forte subteni (per abono) la belan revuon EPĈ kaj per oftaj leteroj al ĈRI, atutoj de tiu lando, por meriti pli kaj pli da subvencio de la ĉina registaro. ■

● KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

★ KOMENCANTO - tre interesa internacia revuo. Poŝtkesto 132, Ekaterinburg, 620041, Ruslando.

★ Liu Yuqun, 38-j. fraŭlino, dez. havi korespond-amikon por formi internacian familion. Adr.: 19-23, Liuji, 545005 Liuzhou,

Guangxi, Ĉinio.

★ Bao Lin, 35-j., volas korespondi kun diverslandaj gefilatelitoj. Adr.: Tonglu Jiguan Youeryuan, 311500 Tonglu, Zhejiang, Ĉinio.

★ Celso Fonseca Jr., 67-j. eksfluginstruktoro, dez. kor. pri aviadiloj, aviadilmodeloj kaj rilataj poŝtmarkoj. Adr.: rua Tiradentes 1183, BR-13215-371 Jundiai SP, Brazilo.

★ E-Klubo de Zuriko dez. kontakti kun oficiale ĝemeligita urbo Kunming, Ĉinio. Adr.: ESZ P.F 858, CH-8034 Zurich, Svisio.

Interkomprenemo¹

– Omaĝe al M. Boulton kaj W. Auld

de LAŬLUM

Mi estas ĉino, vi hispano,
Ŝi japanino, li germano —
Malsamas niaj haŭtkoloroj,
Diversas niaj lingvoj, moroj,
Varias stil' de niaj domoj,
Sed nia nomo — same homo!

Ni vivas sur la sama tero,
Nin kovras sama la ĉielo.
Minacas same nin tertremoj,
Turmentas same nin problemoj.

Manĝ', amoro estas hom-naturo:
Ĉie samas tiuj viv-plezuroj.
Sed pro malsameco de l' medioj
Ja tre buntas niaj homkulturoj.

Fremdas la popoloj unuj al aliaj
Pro diverseco de historioj siaj.
Kaj malsamas revoj kaj reĝimoj,
Inter landoj estas regaj limoj.

Britoj antaŭ cent kaj pliaj jaroj
Per opi' komercis kiel varoj.
Al Ĉinio venis pro arĝento,
Luktis kun ni dento kontraŭ dento.
Kiam mi, okjara eta knabo,
Lernis legi por klerig' de l' kapo,
Aŭdis mi bestion britan-francan
Ĉe Yuanmingyuan², dum ilia rabo.

Mi, dekkvarjara, pro japanaj
invadantoj
Tra l' patrolando migris kun la
rifuĝantoj.
Malsato, morboj, morda malespero:
Mizero maris tiam, murdis min
sufero.

Mi deksesjara iĝis esperanto,
Ĉar tiujare lernis Esperanton:
Eltunko³, mia instruist-amiko,
Ekfaris al mi ideal-transplanton.

Kaj mi ekuzis l' interlingvon
en praktiko.

Per li mi konis Auld kaj
Grigorovon,
Per Esperanto faris kontakt-provon:
Akiris mi amikojn korespondajn,
Ekhavis kamaradojn eĉ tutmondajn.

Mi vidis, ke la lingvo Esperanto
Ja estas vera ideal-portanto.
Ĉar ĝi ebligis ne nur komunikojn,
Sed ankaŭ peris al mi koramikojn.
Mi legis verkojn de Auld kaj
de Boulton,

Por kompreniĝo havis mi rikolton.
Kvankam ilin mi renkontis nur
malfrue,
La prikompreno kreskis kontinue.

Stulta estas ja l' Infana Raso,
Fronte milojn da natur-minacoj:
Sismoj, tromboj, kaj inundoj kaj
tajfunoj —
Ne sufiĉas ili por homar-fracaso?
Kial do militoj, kial do malpaco?
Kial la freneza fratobuĉ' sen laco?

Mi ĝoje vidis, ke l' gejubileuloj
Kun koro plena je skrupuloj
Pri amikeco kaj pri l' monda paco
Strebadas por buĉem-kuraco.
Mi vidis, ke l' gefratoj britaj
Ja estas homoj noblaj, altkvalitaj,
Kun komprenemo kaj kun
toleremo...
Ni trovos solvon de ĉia problemo.

Ekzemple, bonajn lernolibrojn⁴
ili kreis
Sed multekostajn, ke eĉ ĉinoj veis.
Por ke l' progresantoj plu progresu,
Necesis ilin en Ĉini' represi.
Permesojn de l' aŭtoroj do ni
petis,
Kaj ili senhezite jesi pretis.

Eble vi dirus: Tio bagatelas.
Sed tia helpo por ni ja laŭcelas!

Malsamaj estas ĉiuj ni personoj,
Diversas niaj ŝatoj kaj bezonoj.
Sed samas niaj bazaj hom-naturoj,
Kvankam malsamas la kulturoj.
Ni ĉiuj vivas sur la sama tero,
Ni devas kune zorgi pri l' vivsfero.
Por venki la naturajn katastrofojn,
Ni ja bezonas kunagadajn provojn.
Mi ĝojas, ke en nia Esperanto-
rondo
Ekzemplas brile Boulton, Auld
por la estonto,
Pri komprenemo kaj pri kunagemo,
En serĉ' de solvo de ĉia problemo.

1. Ekstraktita el "Lingva arto" eldonita de la Universala Esperanto-Asocio en 1999. Majstroj de la lingva arto, William Auld kaj Marjorie Boulton, havas grandegan meriton en tio, ke Esperanto fariĝis lingvo moderna en ĉiuj sencoj. En la jaro de la 75-a datreveno de siaj Honoraj Membroj UEA gratulas ilin per tiu ĉi jubilea kolekto de eseoj kaj artikoloj.

2. Yuanmingyuan, belega imperiestra ĝardeno en Pekino, pri-rabita kaj detruita de francaj kaj britaj invadantoj en 1860.

3. Eltunko, plumnomo de Xu Shouzhen (1915-1949), fervora e-isto kaj talenta tradukisto de kantoj. Lia avo estas diplomato kaj lia avino francino. Pro la familia influo li admiris Petofi, Danton k.a. kaj martiriĝis pro revolucia aktivado. Li korespondis kun W. Auld, Asen Grigorov k.a. en la kvardekaj jaroj.

4. Nome "Paŝoj por plena posedo" de W. Auld kaj "Faktoj kaj Fantazio" de M. Boulton, kiujn oni represiis po 5 000 ekzemplerojn en Ĉinio por helpi la progresantojn en studo de Esperanto.

Ŝatataj dombestoj en Ĉinio

Kiuj estas la plej ŝatataj dombestoj en Ĉinio? Kiaj estas dekretoj pri dombestoj, ekz. hundoj kaj katoj?

Aira kaj Erkki Röntynen (Finnlando)

de PANG NAIYING

LEGINTE la leteron de ges-roj Röntynen, antaŭ ĉio mi ekmemoris la ruĝbekan papagon bredatan de mia kolego. Ĉiuvespere ĝi paradas en salono, senĉese dirante: "Saluton! Saluton!" Se oni ĝin preteratentas, ĝi do aldonas: "Fi al vi!"

Ĉinoj ŝatas birdojn kaj precipe tiujn kun belaj plumoj. La garoloj kaj graculoj (*Gracula religiosa intermedia*), kiuj povas paroli post facila dresado, plej plaĉas al la homoj. Iu maljunulo bredas graculon. Ĉiutage li instruas al ĝi paroli. Post nelonge ĝi povas reciti poemon. Ĉiufoje, kiam sonas telefono kaj la mastro prenas la aŭdilon, ĝi tuj demandas: "Ha lo, kiun vi volas?"

Ĉiutage, kiam la maljunulo biciklas al parko, ĝi kaŭras sur la bicikla stirilo aŭ ŝultro de la mastro kaj gaje rigardas ĉirkaŭen. Ĝi ŝatas arbojn en la parko kaj nur post vesperiĝo revenas hejmen kune kun la mastro.

Krom birdo, ĉinoj ŝatas bredi en sia hejmo ankaŭ fiŝon, testudon, kuniklon, katon kaj hundon, kaj la lastaj du estas tre popularaj. Antaŭe en kamparanaj kortoj ofte vidiĝis granda hundo, kies ĉefa tasko estis gardi la domon. Oni bredis katojn ĉefe por kapti musojn. Hodiaŭ en la urboj la hundoj kaj katoj preskaŭ perdis tiujn kapablojn kaj fariĝis dorlotataj amuzaj bestoj en la hejmo,

kaj krome la raso de malgrandaj hundoj estas pli preferata.

Banban estas hundeto kun nigra-blankaj haroj. Baldaŭ ĝi estos



Dorlotata hundeto kaj ĝia mastro

3-jara. Ĝia mastro Wang Fei diris al mi, ke ĝi estas angla ŝafhundo.

Banban estas saĝa, vigla kaj komprenema. Kiam la mastro estas malbonhumora, ĝi intime sidas apud li senpetole, sed kiam la mastro estas en bona humoro, ĝi intence petolas, forkaptas ĵurnalon el lia mano kaj ludas kun li. Matene ĝi milde frapetas lin kaj ellitigas lin.

Antaŭe Wang Fei ne lasis la edzinon porti la hundeton hejmen, sed nun li ne povas ne havi ĝin.

Oni diris, ke bestoj estas komprenemaj. Ĉu la katoj kaj hundoj ĉu la birdoj, ili ĉiuj povas gajigi la mastron. Ifoje ili ludas la rolon de kamarado de la mastro. Se al maljunulo mankas infano, la kato kaj hundo povas forpeli lian solecon kaj doni al li grandan ĝojon. Tial, kiam la mastro ameme vokas la besteton, oni opinias, ke li vokas sian infanon. En la harmonia vivo

kun la bestoj oni havigos al si amon al la bestoj kaj al la naturo. En la lastaj 20 jaroj kun pliboniĝo de la popola vivo multe kreskis la intereso de ĉinoj pri bredado de dombestoj. Sed pro diversaj kaŭzoj iuj forlasis sian dombeston, kiu akompanis ilin longatempe. Bedaŭrinde, nun la koncerna leĝo protektas nur bestojn baldaŭ pereontajn. Tiuj homoj, kiuj forlasis la de ili bredatajn bestojn, estas riproĉataj de la publiko. Ankaŭ la amaskomunikiloj admonas: "Kiam la malgranda besto estas bredata de homoj, ĝi do ekhavas tre intiman senton al la mastro. Se vi decidis bredi la beston, vi do devas porti la respondecon por ĝi ĝis la fino." Iu universitata profesorino kolektis la senhejmajn katojn kaj hundojn kaj fondis bazon por protekti ilin. Ŝia faro estas multe atentata kaj helpata de la socio.

Por konsciigi la socion pri protektado de dombestoj, nun estas preparata "Pekina Asocio por Malgrandaj Bestoj" far la popola mediprotekta societo "Amikoj de Verdo".

Antaŭe en urboj plurfoje okazis akcidento, ke hundo mordis homojn, tial bredado de hundoj estis malpermesata en la urboj. Antaŭ kelkaj jaroj tia malpermeso estis nuligita, tamen bredi hundojn devas observi regulojn: Kiu bredas hundon en la urba kvartalo, pagu imposton kaj ĉiujare injektu al la besto 6 vakcinojn. La hundoj havas ĉiu sian identecan karton kun foto, aĝo, sekso, raso, koloro kaj aliaj trajtoj kaj sur ĝi legiĝas ankaŭ la nomo de ĝia mastro, ties aĝo, profesio, adreso k.a.

Nun en Ĉinio nur malmultaj familioj havas katon kaj hundon, kiuj tamen estas multe atentataj. Oni fondis hospitalon por la bestoj kaj en superbazaroj vendiĝas manĝaĵoj por hundoj kaj katoj kaj foiro de dombestoj ofte estas tre vigla. Ĉirkaŭ bonrasa besto ĉiam estas multaj rigardantoj. ■

La masto de la novjaro

(Vjetnama fabelo)

EN Vjetnamio la novjara festo de la nacio nomiĝas la Têt. Kiam alproksimiĝas la Têt, la vilaĝanoj plantas antaŭ sia domo tre grandan bambuan maston. Al la pinto de la masto oni alkröças pafarkon, sagon, tintilojn kaj timbalojn, esperante celi malfeliĉon kaj demonojn kaj havi bonŝancon en la venonta jaro.

La bela vetero revenas post la malvarma vintro. La rozaj persikfloroj malfermas siajn ĉarmajn petalojn. Ĉirkaŭite de siaj genepoj, avino ekrakontas:

— Antaŭe, la malbona demono estris la tutan terglobon. La homoj devis pene, penege labori por tiu demono.

La unuan fojon la demono aperis antaŭ la kamparanoj kaj diris:

— La supra parto de la plantoj estos al mi.

La kamparanoj povas preni tion, kio restas.

Iun jaron la kampo donis bonegan rikolton. La rizejo etendis siajn flavajn tapiŝojn. La demono revenas kaj prenas la pezajn spikojn. Al la kamparanoj restas nur pajlo kaj stoploj. La homoj jam penege laboris, esperante manĝaĵon kaj vestaĵon. Kaj nun, ho ve! Ĉio estas perdita, tute perdita ilia penado! Ili ploras, ĝemas kaj krias. Ilia malfeliĉo aŭdiĝas ĝis la Ĉielo.

La feo aperas kaj konsilas:

— Ĉi-foje plantu bataton!

La kamparanoj arde laboras, akvumas kaj tutkore prizorgas, por ke la plantoj bele kresku.

Alvenas la rikolto. Kiel interkonsentite, oni rezervas al

la demono la supran parton de la plantoj. La kamparanoj rikoltas nur la malsupran parton, kiu estas la tuberoj.

La demono vidas nur foliojn kaj tigojn. Freneza de kolero, li krias, saltas kaj hurlas. Li anoncas:

— Ekde nun vi devas rezervi al mi kaj la radikojn kaj la tigojn. Tio, kio restos, apartenos al vi!

Ĉi-foje la demono estas certa, tre certa, ke li triumfos.

Iun sezonon la homoj plantas nek rizon nek bataton, sed maizo kreskas verde, verdege en la kampoj. Estas rezervitaj al la demono kaj la radikoj kaj la krestoj de la plantoj. La homoj rikoltas nur la maizon, kiu kreskas sur la tigoj, meze de la planta trunko.

Ankoraŭfoje vidante, ke la homoj estas tre inteligentaj kaj laboremaj kaj per tio ili jam venkis ĉiujn malbonajn spiritojn, la demono decidas repreni la tutan kamparon.

La homoj preĝas al la feo, kiu tuj aperas kaj donas konsilon:

— Demandu la demonon, ke li cedu al vi malgrandan pecon da tero sufiĉan por planti nur unu bambuon, sed antaŭsciigu lin ke la tero apartenos al vi ĉie, kie la ombro de la bambuo kovros.

En vento la verda bambuo moviĝas, balanciĝas kaj ĝia ombro

etendiĝas vaste kaj vaste.

Tial oni alkröças pafarkon, arbaleston kaj tintilojn por celi ĉiujn malbonajn animojn. Ĉiufoje la demono aŭdas timbalojn kaj tintilojn soni en la aero. Li timas kaj tremas, sciante ke la saĝeco kaj firma volo de la homoj jam superas ĉiujn malbonajn diablojn. Li do foriras por ĉiam, lasante la kamparon ekflori sub la laboremaj manoj de la homoj. ■

(Esperantigita de
Feniksa Hoang Minh Phung)



ĈINIO

● Okaze de la 140-a datreveno de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof, la 50-a datreveno de liberigo de la urbo Chengdu kaj martiriĝo de Eltunko kaj aliaj samideanoj por nia respubliko kaj por nia movado, Chengdu-aj



Chengdu-aj e-istoj antaŭ la monumento de la martiriĝo

esperantistoj kunsidis kaj eldonis memorgazeton. En la 18-a de decembro ili fotis sin antaŭ la monumento de la martiriĝo. Ĉiuj ĉeestantoj esprimis sian volon fortigi nian movadon kaj disvastigi la influon de nia lingvo. Ili ankaŭ deziris komunikiĝi kun ĉiuj esperantistoj kaj aliaj amikoj tra la mondo. (Cheng Wankuan)

● Por festi la 140-an datrevenon de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof, la revenon de Makao al la patrujo kaj la alvenon de la nova jarmilo, la Liaoning-a E-Asocio (LEA) okazigis kunvenon en la 19-a de decembro 1999. S-ro Wang Renhu, prezidanto de LEA, faris festparoladon, kaj s-ro Wu Guojiang, ĝenerala sekretario de LEA, resumis la laboron de la jaro 1999 kaj prezentis la planon por la jaro 2000. (Wu Guojiang)

● La 31-an de decembro 1999 la ĉina poŝto emis iis poŝtmarkosieron "La retrorigardo pri 20-a centjaro". La Haikou-a



Filatela Kompanio uzis en la emisia tago poŝtstampilon kun vortoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui.

FRANCIO

● Danke al iniciato de s-ro F. X. Gilbert, prezidanto de la regiona asocio Esperanto France-Est, estas eldonita luksa Esperantlingva prospekto de Monda Centro de la Paco — Centre Mondial de la paix, Place Monseigneur Ginisty FR-55100 Verdun. Tel. +33(0)3 29 86 55 00; fakso: +33(0)3 29 86 15 14; e-poŝto: cmpaix@wanadoo.fr. La prospekto povas esti petata eĉ plurekzemplere por kunvenoj ĉe la supra adreso.

(Ludwig Edmond, take, ladomo@wanadoo.fr)

HUNGARIO

● En Hungario je kelkaj tagoj antaŭ Kristnasko aperis "Resuma Esperanto-gramatiko" (red. Laszlo Szilvasi, eldonejo Eventoj), kiu krom la lingvaj eroj enhavas ankaŭ ĉ. 50-paĝan ĉapitron pri la E-movado (ekesto de la Internacia Lingvo, E-servoj, utiligebloj, interreto, organizoj ktp. ĉie kun konkretaj priskriboj kaj adresoj), kaj klopodas instigi la lernantojn ne nur ĝui la avantaĝojn de Esperanto, sed ankaŭ persone kunlabori al la funkciigo de la movado. Tiu ĉi gramatik-libro estas aĉetebla krom en la movadaj libroservoj ankaŭ en ordinaraĵ librovendejoj dise tra la lando.

(Laszlo Szilvasi, eventoj@esperanto.org)

POLLANDO

● Filio de Pola Esperanto-Asocio en Koszalin organizos en la tagoj 30.05. — 11.06.2000 la 22-an Ĉebaltan Esperantistan Printempon en tre ĉarma ripozloko Mielno, pitoreske situanta inter

Balta Maro kaj Jamno-lago, 12 km. nordokcidente de la distrikta urbo Koszalin. La programo de ĈEP antaŭvidas interesajn prelegojn kun videofilmoj, konkursojn kun valoraj premioj, ĉiutagan lingvoperfektigadon, kantadon, dancadon, promenadon, sunumadon, perbusajn ekskursojn al vizitindaj lokoj, bivakfajron ktp. Esperantistoj el diversaj landoj havos ŝancon prezenti propran programon kadre de Naciaj Vesperoj. Korespondadreso: Pola Esperanto-Asocio, Box 30, 75-016 Koszalin-1, Pollando. Telefono: 094/3404-563 (petu s-ron Baranowski)

(Pola Esperanto-Asocio)

RUSIO

● La 18-an de decembro 1999 Festo por memori la 140-jariĝon de L.L. Zamenhof okazis en For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato de Vladivostoko, Rusio. La studentoj, kiuj studas Esperanton kiel nedevidigan studobjekton, kaj la membroj de Regiona E-Klubo "Pacifiko" partoprenis la literaturmuzikan koncerton, jubilean ekspozicion kaj aktivis pri kantoj kaj teumado. Inter gastoj estis junaj muzikistoj el la ensemblo "Melodio" kaj rusparolantaj studentoj el Ĉinio kaj Koreio. La sekva renkontiĝo okazis dum la semajno de Internacia Amikeco februare, 2000. La studentoj (20-j.) ege interesiĝas pri la kontaktoj kun samaĝuloj kaj samfakuloj tutmonde. Krome ili invitas ĉiujn dezirantojn partopreni la Regionan Studentan Konferencon (sekcio Esperantologio kaj Interlingvistiko), kiu okazos en Vladivostoko la 24-29-an de aprilo 2000. Okazos ankaŭ la Tagoj de Slava Kulturo la 22-28-an de majo kaj la Renkontiĝo por la 20-jariĝo de E-klubo "Pacifiko" la 20-22-an de oktobro. e-poŝto: oriento@mail.ru & oriento@yahoo.com.

(A. Titajev)

Raporto pri la vojaĝo en Ĉinio

S-ro Wang Tianyi diris, ke en Esperantujo estas multaj "lignoj" sed mankas farantoj de fajro. Dum oni lasos la "lignojn" sen fajro, ili iĝos malsekaj kaj eĉ putraj. Se mi, membro de KAEM, iom sukcesis meti fajrojn sur la "lignoj" en la mallonga vojaĝo en Ĉinio, tio estas por mi aparte ĝoja kaj emocia.

de TAKEUTI YOSIKAZU
(Japanio)

DE 1988 la ĉina urbo Changzhou, kiu situas ĝuste meze inter Ŝanhajo kaj Nankino, havas ĝemelan rilaton al la urbo Takatuki, kie mi loĝas. Kaj la 5-6-an de novembro 1999 mi denove vizitis tiun urbon aliĝinte al la delegacio el 37 urbanoj de Takatuki estrata de s-ro urbestro. Tio estis por mi la naŭa vizito al Changzhou, ĉar mi nepre veturis tien preskaŭ ĉe ĉiu mia vojaĝo en Ĉinio ekz. post la preparaj kunsidoj por la Unua Azia Kongreso en Ŝanhajo. Gravas por mi ofte renkontiĝi kun lokaj samideanoj, kies organizaĵo ĝemeliĝis al Esperanto-Societo en Takatuki jam en 1986, du jarojn pli frue ol ambaŭ urbestroj oficiale subskribis la kontrakton. Mi ne tre ŝatas vojaĝi en mallibera karavano el neesperantistoj, sed ĉifoje mi decidis aliĝi al la delegacio, jen kial: Unue, la magistratanoj de Takatuki akceptis mian deziron tute libere agi unuavice por Esperantaj aferoj ofte forestante de la karavana itinero krom ĉeesti la oficialajn aranĝojn. Due, al la delegacio aliĝis la estro de la elementa lernejo en Takatuki nomata Yosumi, kiu ankaŭ ĝemele rilatas al la elementa



Takeuti Yosikazu en E-kurso de la Qingtan-a Mezlernejo

lernejo en Changzhou nomata Dongfang pere de la konstantaj helpoj de Esperantaj organizaĵoj de ambaŭ urboj. Trie, post la programoj en Changzhou la karavano turisme flugos al la urbo Xi'an, kie tre aktivas loka esperantista grupo. Kvare, mi estas direktoro de Internacia Asocio de Takatuki, oficiala instanco de la urbo por eksteraj aferoj, kaj oni do faris min vicestro de la delegacio. Profitante la okazon mi ege esperis ke mia vizito nepre estos instiga al la simpatiaj samideanoj en Changzhou, kiuj vere klopodas por teni sian forton en ne ĉiam favorajj cirkonstancoj.

Estas aparte notinde ke en Changzhou troviĝas du lernejoj kie Esperanto estas oficiale instruata. Unu estas mezlernejo nomata Qingtan kaj la alia estas elementa lernejo Dongfang. La 6-an de novembro mi disponis la tutan tagon por la vizitoj al ambaŭ lernejoj. Matene oni veturigis min al Qingtan-mezlernejo. Ĉe la

pordego min atendis la estro kaj gravuloj de la lernejo kune kun ses miaj konataj samideanoj de Changzhou-a Esperanto-Asocio en bonvenigo de muzika bando de lernantoj. Ili gvidis min en la ĉefajn instalaĵojn, kaj poste kondukis al la ĉambro por Esperanta kurso, kie min mirigis plena ĉambro da lernantoj, kiuj estis pretaj ĉeesti mian lecionon. Fakte en la ĉambro estis ĉ. 60 lernantoj el du grupoj elementa kaj iom progresinta. Plezure estis provi konversacion kun la lernantoj en Esperanto uzante nur verŝajne por ili lernitajn vortojn. Dum la leciono mi disdonis al ili anticipe preparitajn muziknotojn de japana kanto, kiu onidire estas ŝatata ankaŭ de ĉinoj kaj kies teksto estas Esperantigita. Devas esti rara sperto al ili ĉeesti lecionon far alilanda esperantisto. Ĝenerale la kurson gvidas juna kaj simpatia samideano s-ro Pan Yajiang, teknikisto pri komputilo.

Posttagmeze mi vizitis la elementan lernejon Dongfang, ankaŭ kie ekzistas Esperanta kurso de antaŭ dek jaroj kaj mi gvidis ĝin jam sufiĉe multe da fojoj ĉe ĉiu mia vizito. Ĉifoje mi vizitis la lernejon duope kun la estro de la elementa lernejo Yosumi en Takatuki, ĝemela lernejo al Dongfang. Okazis seriozaj interŝanĝoj de opinioj kaj spertoj inter ambaŭ lernejestroj kaj la kunsidantaj instruistoj pri la fakaj aferoj precipe pri la edukprogramo por la estontaj jaroj. Interpretis la diskuton mi kaj s-ro Zhang Changsheng, kiuj ambaŭ estas prezidantoj de la lokaj asocioj. Post la kunsido la estro de Yosumi diris, ke li estis sufiĉe konvinkita pri la forto de Esperanto, kiu sukcese ludis la rolon de punta lingvo por komunikado de la japanaj kaj ĉinaj ĉeestantoj. En elementa lernejo Dongfang laboras esperantista instruistino s-ino Jiang Zhengfang kaj konstante flegas la Esperantan kurson, kio sendube kultivis favorajn cirkonstancojn por la kontinueco de la kurso.

Vespere de la sama tago mi

kunsidis kun dek lokaj samideanoj en la salono de la hotelo, kie mi loĝis. Ĉar ĉiuj ĉeestantoj estas miaj malnovaj amikoj kaj bone konas unu alian, niaj interparoloj estis kvazaŭ daŭrigo de tiuj en la lasta renkontiĝo en aprilo de 1997. La Changzhou-a Esperanto-Asocio nun havas ĉ. dek aktivajn membrojn, kiuj kutime kunsidas en la domo de la prezidanto. Antaŭe la asocio havis pli da membroj, sed forlasis ĝin tiuj, kiuj unuavice celis ekonomie profiti per Esperanto. Tamen al mi ŝajnas ke la asocio nun havas pli da memstareco kaj stabileco ol iam ajn antaŭe en la senco, ke ĝin tenas unue la propra forto de la civitanaĵaj membroj, kiuj fakte pagas sian kotizon.

Kaj granda avantaĝo por ili estas, ke tie en du municipaj lernejoj Esperanto estas oficiale instruata, kaj plie, ke ili povas konstante kunlabori kun ni, esperantistoj de la ĝemela urbo en Japanio. Dum la kunsido ili ne kaŝis ankaŭ pri la negativaj flankoj de sia agado, precipe pri la

bezono altigi la nivelon de lingva scipovo kaj tiucele havigi al si elstarajn instruistojn kaj taŭgajn lerno-materialojn. Estus signife, ke ilin helpos samideanoj de relative proksimaj urboj kiel Ŝanhajo.

La 7-an ni flugis al la urbo Xi'an, kaj vespere min atendis s-ro Wang Tianyi en mia hotelo. Revidi lin estis por mi unu el la celo de la vojaĝo, ĉar mi ŝatis sperti unikan trajton de Esperantomovado de tiu antikva metropolo de Ĉinio. La 6-7-an de novembro la Unua Esperanta Konferenco pri Agrikulturo kaj Medio okazis en la Nordokcidenta Agronomia Universitato en Yangling. Ĝin partoprenis 14 fakulo-esperantistoj.

Je mia ĝojo kaj honoro plejparto de la konferencanoj venis al Xi'an por renkonti min. Estis feliĉe kunsidi kun la samideanoj, kiuj ne nur plene posedis la lingvon, sed havis multon por diskuti. Pri la konferenco raportis s-ro Huang Yinbao, ĝenerala sekretario de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio. Kvankam mi estas laiko en tiu kampo, tamen mi ege konsentis kun li pri liaj pensoj kaj agadprincipoj, ke trakti favorajn cirkonstancojn por Esperanto necesas antaŭ ĉio montri al la socio vere konvinkajn atestaĵojn t. e. utilajn laborfruktojn akiritajn en sia fako per Esperanto. Fakte li tiel laboris kaj sukcesis fari aŭ magistratanojn de loka

komercado, sed ĉiam serĉas la okazon perfekte negoci per Esperanto. Ni ambaŭ same opiniis pri la bezono de terminaro pri komercaj aferoj.

Mi revenis al la hotelo en sufiĉe malfrua nokto. Tiam min telefonvokis kolego de s-ro Wang, kiu pro afero ne ĉeestis la kunsidon, sed tre deziris min renkonti. Mi akceptis lin kaj agrable interparolis kun li. Post lia foriro denove sonis la telefono de mia ĉambro. Aŭdiĝis voĉo de virino. Ŝi estas membro de la Xi'an-a Esperanto-Asocio kaj ege ŝatis interparoli kun mi almenaŭ telefone. Mi estis tiel kortuŝita de la du gesamideanoj, kiuj tiel aktive sin turnis al mi por interparoli Esperante.

La 8-an de novembro ni veturis al la urbo Yangling, kiu situas ĉ. 100 kilometrojn okcidente de Xi'an. Yangling estas nun konstruata urbo kiel nacia centro pri agrikulturo kaj la koncernaj kampoj. Ni vizitis Entomologian Muzeon de la Nordokcidenta Agronomia Universitato. Ĝi estas la plej granda muzeo



Takeuti Yosikazu gastas en la Xi'an-a E-Asocio.

en tiu fako en Ĉinio kaj tiel impona kaj kleriga per siaj ekspozicio de valoraj materialoj, kiuj reflektas la nunan atingon de entomologio. Prof. Io Chou, maljuna esperantista entomologo, intervidiĝis kun ni certe kun aparta favoro. De antaŭe mi bone sciis pri la profesoro. En la muzeo troviĝis aparta ekspozicio pri lia esperantista agado.

La 10-an de novembro mi jam estis en Ŝanhajo, kaj al mi restis plano revidi s-ron Wang Minghao, mia kara amiko kaj motoro de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto en 1996. Ni gaje kaj serioze interŝanĝis opiniojn pri Esperantomovado en Azio. ■

La 10-an de novembro mi jam estis en Ŝanhajo, kaj al mi restis plano revidi s-ron Wang Minghao, mia kara amiko kaj motoro de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto en 1996. Ni gaje kaj serioze interŝanĝis opiniojn pri Esperantomovado en Azio. ■

La 10-an de novembro mi jam estis en Ŝanhajo, kaj al mi restis plano revidi s-ron Wang Minghao, mia kara amiko kaj motoro de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto en 1996. Ni gaje kaj serioze interŝanĝis opiniojn pri Esperantomovado en Azio. ■

Chen Chuhua kaj lia hejma muzeo de tuĝja-a kulturo

La muzeo de Chen impresas kiel hejmo de indiĝenoj; ĉiu meblo en ĝi montras antikvajn kutimojn kaj morojn de tuĝja-oj


Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

LA pitoreskejo Zhangjiajie kun imponaj montoj kaj belaj arboj ĉarmas en la okcidenta parto de Hunan-provinco. Ĝuste en tiu bela loko vivas tuĝja-oj. La 53-jara Chen Chuhua, honesta kaj sunbruna, estas filo de tuĝja-oj. Li diris al mi, ke la prapatroj de tuĝja-oj parolis sian propran lingvon, sed ne havis la skriban. Pro tio, la tuĝja-a kulturo estas konata malvaste. Rigardante la pompajn montojn kaj ĉarman akvon, Chen ofte demandis sin mem, kie kaŝiĝas la kulturaj restaĵoj respondaj al la naturaj pejzaĝoj.

Foje, li renkontis en profunda montaro maljunulon,

kiu hakis malnovan difektitan meblon kun ege delikataj gravuraĵoj por uzi la lignon kiel



Chen Chuhua

hejtaĵon. Jen “libro” postlasita de prapatroj! Sed ĝi forbrulis iom post iom en fajro. Korpremate, Chen subite komprenis, kion li devas fari.

Ekde tiam, li vizitis multajn vilaĝojn en okcidenta Hunan-provinco por serĉi historiajn

objektojn de la montregiona nacio Tuĝja. Li decidis ripari tiujn difektitajn restaĵojn kaj reaperigi ilin en la mondo. Pasis pli ol 20 jaroj kaj Chen ja posedas hejman muzeon.

NIĈO, GEEDZIĜAJ VINO KAJ LITO

La muzeo de Chen impresas kiel hejmo de indiĝenoj. Tie ĉiu meblo montras antikvajn kutimojn kaj morojn de tuĝja-oj. Antaŭ la niĉo fumas incenso kaj brilas kandeloj, ŝajnas, ke ĵus finiĝis ceremonio por kulti prapatrojn. Ĉe murangulo estas granda kalabaso en ujo delikate plektita el bambuo. Siatempe tuĝja-aj viroj portis en ĝi trinkakvon kun si dum fiŝado kaj ĉasado. Sur lignaj subportiloj kun belaj gravuraĵoj sidas du vinvazoj plenaj de “doto-vino”. Laŭ kutimo tuĝja-oj ekfaras tian vinon en la tago de la naskiĝo de la filino kiel la doton ĉe ŝia edziniĝo.

Loĝante en densa arbaro, tuĝja-oj akvumis kampojn per ligna norio, elpremis oleon per



La hejma muzeo de tuĝja-a kulturo

ligna premilo kaj ventumis per ligna ventumilo. Iliaj mebloj inkl. de kovriloj de vinvazoj estis faritaj el ligno kun gravuraĵoj. Sur la kovriloj de vinvazoj por novaj geedzoj gravuriĝis feino donacanta filon aŭ birdoj anoncantaj bonajn novaĵojn kaj sur tiuj de ordinaraj vinvazoj — knabo respekte proponanta vinon al avo, aŭ pino kun grupoj, simbolo de longa vivo... La plej okulfrapa estas ligna lito bele



Akvogutiga lito

gravurita. Chen diris, ke lito estas loko, kie la homoj naskiĝas, ripozas kaj mortas, pro tio antikvaj tuĝja-oj ne ŝparis monon kaj tempon por delikate gravuri ĝin. Ili gravuris sur la lito siajn vivon, kredon, naturajn estaĵojn, rakontojn, legendojn kaj mitojn cirkulantajn en la loko de generacio al generacio. Por bebo la lito servas kiel propedeŭtika loko por koni la mondon. Sur la lito estas bildo, ke aro da knaboj petolas en klasĉambro kaj instruisto riproĉas ilin. Ĝin montrante, Chen diris al mi: “Tre interese. Tio probable estis bona instrumentaĵo antaŭ 200-300 jaroj por instigado de infanoj al lernado.”

La lito similas al delikata ligna dometo. Ĝiaj 3-7-tavolaj aleroj tre similas al la akvodrena tegmentrando de tuĝja-aj loĝdomoj. Ĝi portas la nomon Akvogutiga Lito. De Chen mi informiĝis, ke antaŭ sia edziniĝo tuĝja-aj knabinoj havas kutimon ploradi ĉiutage, sidante sur la lito en sia gepatra hejmo. Ili kaj ploradas kaj kantadas, elverŝante larmojn. Jen alia deveno de nomo de la lito.

BROKAĴO, LIGNA TAMBURO KAJ KANTO POR SARKADO

Kvankam la kolektaĵoj de Chen plejparte estas popolaj, tamen estas malfacile distingi artaĵojn de ĉiutagaj bezonaĵoj. Kaj ĉio tio sur la gravurita lito estas brokita kaj brodita, ĉu la litkovrilo kaj matraco, ĉu ŝuoj, ĉapoj kaj vindotukoj, ĉu gefianĉigaj mansaketoj, ĉu vestoj por virinoj kaj kirasoj destinitaj por dancado dum kultado al prapatroj... Tuĝja-oj ŝatas fari brodaĵojn blua aŭ blanka, kaj brokaĵojn kun varpoj el naturblankaj fadenoj kaj veftoj el la buntaj, kiuj plejparte servas kiel litkovrilo. Tiu metio komenciĝis de antikve. En historia libro antaŭ 2 mil jaroj legiĝas: “Tuĝja-oj teksas el arboŝelo kaj tinkturas per suko de herbosemoj. Ili portas vestojn en bunta koloro.” Samkiel gravurado, ankaŭ brokado kaj brodado de tuĝja-oj devenas de la ligna kulturo.

Eĉ ilia kantado ne disigeblas de herboj kaj arboj. La plej primitiva muzikilo estas folio

de arbo. Junuloj metas ĝin en la buŝon kaj blovas per ĝi amkanton por peti manon de knabino. La ligna tamburo servas kiel instrumento por akompani tuĝja-ojn en kolektiva sarkado. Ĉar antaŭe tie estis multaj sovaĝaj bestoj, oni ne povis sole labori en kampo por sekureco. Ne povante plugi kun bovo kampojn sur kruta montodeklivo, oni mane eltiras herbojn rapide kreskantajn. Ĉar la laboro estas temporaba, tial la montanoj helpas unu alian kaj centope laboras kune. Tiel oni elektis du personojn por tamburado kaj kantado por vigligi la laborantojn. Sekve, la historiaj rakontoj kaj legendoj gravuritaj sur ligno estas kantataj dum sarkado akompanate de tamburado. Jen formiĝis la moro.

“RIĈULO” SEN GROŜO

Amatoroj, ĝenerale dirite, estas riĉuloj. Antaŭ 20 jaroj Chen estis laboristo kun monata salajro de nur 31 juanoj. Tiam aĉeti gravuritan liton kostantan je 160 juanoj estis super lia povo. Pro tio, lia edzino kaj iliaj du filoj ŝpare vivis, sed la

prezo de la lito plurfoje altiĝis. Nur post kiam li akumulis 600 juanojn, lia deziro realiĝis.

Por kolektado Chen penegis laboris. Kun pli da mono liaj kolektaĵoj multiĝis. Li jam sukcese kolektis ses "akvogutigajn litojn", tamen lia tuta familio dormis sur planko. Por aĉeti la multekostan niĉon por prapatroj, li vendis ĉiujn meblojn en la hejmo. Fakte, se li vendus nur malgrandan objekton el siaj dekmil kolektaĵoj, la sumo sufiĉus por kelkara vivtenado de la tuta familio. Foje iu volis aĉeti per kelkcent miloj da juanoj lian buntan ŝtonan skulptaĵon de Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi prezentas la vivon de antikvuloj en bieno: Ili faras aŭ fiŝadon aŭ arbohakadon, aŭ kamplaboron, aŭ legadon. Chen trovis ĝin sur kokejo de montano. La mastro vendis ĝin kontraŭ malalta prezo. Chen prenis ĝin kiel la plej valoran trezoron de la muzeo. Kiel ajn malfacila estis la vivo, li ne vendis ĝin. Li diris, ke historiaj restaĵoj ne apartenas al li mem, do li havas nur devon konservi ilin, sed ne rajton vendi ilin.

NEDISIGEBLA SANGO-HEREDO

Chen faris ĉion tion ne nur por kolektado, sed ankaŭ por konservi la nacian kulturon, opiniante, ke kolektado estas bazo de studado. Por skribi la kulturalan historion de tuĝja-oj, li senlace fosas en tio kaj sisteme bonordigas la akiritajn materialojn por fine fari verkon. Ĝojindas, ke lia unua filo, diplomiiĝinte el ĉinlingva fakultato de universitato, jam komencis esploradon pri tio kaj la dua estos lia kompetenta helpanto, fininte sian lernadon eksterlande.

La afero de Chen estas atentata kaj subtenata de diversaj rondoj de la socio. Iu Taiwan-a fasonistino



Gravuraĵoj sur akvogutiga lito


telefonis al Chen el hotelo en profunda nokto, ke ŝi tiel emociiĝis post vizito de lia muzeo, ke ŝi ne povis endormiĝi, kaj ŝi volis iom babili kun li. Dekkelkajn minutojn poste, ŝi aperis antaŭ Chen. Enirinte en

la ĉambron, ŝi diris: "Belegaj estas brodaĵoj de tuĝja-oj. Mi venas serĉi la radikon kaj mi trovis la patrinan arton." Nelonge poste, alia Taiwan-anino vizitis Chen kun espero starigi kune kun li ĉinan brodejon.



Gravuraĵoj sur akvogutiga lito

Chen certiĝis, ke la tuĝja-a kulturo ne perdiĝos. Li adiaŭis nin kun rideto. Post li estis lia antikveca muzeo — la Monthalo Xiuhua. Tiu tradicia tuĝja-stila loĝdomo estis projektita de li mem. Li planas konstrui ankaŭ montvilaĝon en cent-po-centa tuĝja-a stilo, por ke tiuj, kiuj volas persone sperti tuĝja-ajn morojn, loĝu en palafito, ĝuu tuĝja-ajn manĝaĵojn, elpremu oleon en olefarejo, broku per ligna brokilo, brodu sur blua tolo, tamburadu kaj kantu en montaro. ■



Brokaĵoj de tuĝia-oj en la muzeo de Chen

Danzeng kaj lia gastejo

Alilandanoj venis al Tibeto ne por loĝi en luksa domo, sed por sperti la vivon sur la altebenaĵo

de PU CIREN

ASPEKTE la pli-ol-60-jara Danzeng estas ordinara tibetano, tamen li kaj lia gastejo estas tre famaj en Xigaze, la dua granda urbo de Tibeto. Vizitgrupoj el 3-5 alilandanoj ofte tranoktas en lia gastejo.

La gastejo, sidanta ĉe bazono, estas nova tibetstila domo kun blankaj muroj kaj buntaj fenestroj. Sur la muro ekster la pordo legiĝas la vortoj en la lingvoj tibeta, han-a kaj angla: "Gastejo Danzeng". En la dekkelkaj jaroj en ĝi tranoktis pli ol 10 mil homoj el pli ol 20 landoj kaj regionoj.

Per kio ĝi allogis tiel multajn gastojn? Pri tio Danzeng ĉiam konigas la jenan historion: Iun vesperon kelkaj alilandaj turistoj ĵus atingintaj Tibeton embarasiĝis pro tio, ke ili ne trovis konvenan lokon por manĝi. Danzeng gastigis ilin hejme kaj regalis ilin per tibetaj manĝaĵoj mem preparitaj.

Tio ege ĝojigis ilin, kiuj gaje diris kun viglaj gestoj, ke ili vidis ĉi tie la veran Tibeton.

Tio havigis al Danzeng la ideon funkciigi gastejon kaj donis al li administran metodon. Li komprenis, ke alilandanoj venis al Tibeto ne por loĝi en luksa domo, sed por sperti la vivon sur la altebenaĵo. Eblas, ke ili

bezonas ne luksan hotelon, sed bezonas tranoktejon kun tibetnacia koloro. Danzeng diris, ke la prezo por tranoktado en lia gastejo ne altas, tiu por unu ĉambro estas respektive 50 juanoj, 15 juanoj kaj pli malkara por

amasloĝejoj. Kia ajn la prezo por unu nokto, la ĉambro kaj litkovriloj estas absolute puraj. Li dungis tibetan kuiristinon kaj liveras al la gastoj memservajn manĝaĵojn tibetajn kaj eŭropajn, dum bolinta akvo kaj teo estas liverataj tage kaj nokte. Sur la balkono de la dua etaĝo troviĝas tibetstilaj tendoj, tabloj kaj seĝoj. Tie oni povas ne nur trinki kafon, hordean vinon, buteran kaj dolĉan teon, sed ankaŭ manĝi fromaĝon, zanba (manĝaĵo el bakita sekala pasto)...

La gastejo Danzeng renomas ankaŭ pro la zorgema servo. Danzeng diris, ke alilandaj turistoj vojaĝantaj en Tibeto ne bone konas la lokon kaj havas malfacilon aranĝi siajn aferojn, do li multe helpas ilin en tio. Li helpas ilin ankaŭ en mendo de turismaj kaleŝoj kaj ĉevaloj.



Gastejo Danzeng



Danzeng

Se iu malsaniĝis, li tuj kondukis lin al hospitalo. Por oportuni al la gastoj, li ekipis la ĉambrojn per televidilo, telefono, ĵurnaloj kaj gazetoj en fremdaj lingvoj.

Antaŭ ol funkciigi la gastejon, Danzeng iam administris butikon, laboris kiel koĉero kaj kuiristo, sed neniam lernis fremdan lingvon. En la komenco, kiam li akceptis alilandajn turistojn en sia gastejo, li parolis kun ili per gestoj. Iom post iom li lernis fremdan lingvon kaj nun li scipovas paroli en tia lingvo pri ĉiutagaj aferoj. Por disvolviĝo de sia kariero, li sendis sian nepinon eksterlanden por lerni la lingvon. Nuntempe ŝi estas lia bona helpanto.

Xigaze, unu el la plej riĉaj lokoj de Tibeto, estas tre bela urbo. Tie sidas la templo Zhashi Lunbu, unu el la plej grandaj lamaismaj temploj kaj en ĝi iam loĝis majstro Banĉen la Deko. Post lia nirvano, ĝi fariĝis lia ripozejo por eterne. Pro tio, tiuj, kiuj vojaĝas al Tibeto, nepre vizitas ĝin. Se vi, niaj karaj legantoj, vizitos Xigaze en la estonteco, nepre vizitu la gastejon Danzeng. ■



La unua filino de Wang (meze) laboranta en vestovendejo

Ilia vivo ŝanĝiĝis

Teksto kaj fotoj de BU TIELI

Wang Wenxiu estas 54-jara kamparanino. Ŝia hejmvilaĝo sidas en Anhui-provinco, orienta Ĉinio. Dum longa tempo ŝi vivis malfacile, ĉar la loko havis agrojn nesufiĉajn por la loĝantoj kaj krome ŝi devis vivteni la kriplan filon kaj malsanan bopatriron.

Antaŭ dek jaroj ŝi venis en Pekinon kun du filinoj. Ili enloĝiĝis en luita domo. Ĉiutage ŝi ellitiĝis je la tria matene kaj komencis balai straton kaj per tio enspezis ĉiumonate 300 juanojn (ĉ. 8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro). Je la kvina ŝi revenis hejmen por matenmanĝo kaj post tio hastis al kvar familioj por laŭhora laboro. Ŝi servis al ĉiu el ili po unu horo

ĉiutage kaj gajnis nur 2.5 juanojn por ĉiu horo.

Ŝiaj filinoj, klerigitaj, laboris ne tiom penige. Unu estis dungito de vestovendejo kaj la alia havis okupon en fotostudio. Ĉiumonate la

patrino kaj la filinoj enspezis pli ol 3 000 juanojn.

La edzo de Wang laboris kiel instruisto en la hejmvilaĝo kaj ricevis ĉiumonate ilian monon. Nun ilia vivo multe pliboniĝis.



La dua filino de Wang en fotostudio



1	3
	4
2	5

1. Laŭhora laboro
2. Wang kaj ŝia dua filino en poŝtoficejo por sendi monon hejmen
3. Li vizitas siajn patrino Wang kaj fratinojn.
4. Aĉetado de legomoj por la mastro
5. Wang balaanta straton







Urbeto sur lago

Neniu povas ĝuste diri, kie estas la hejmloko de tiuj fiŝistoj, kiuj vivas sekvante fiŝarojn

de PANG NAIYING

VINTRE aŭdiĝis sur la lago Honghu nek kanto de fiŝistoj nek knaro de rulo, eĉ kvietiĝis anasoj, kiuj ŝatas sin distri en akvo. Nur akvo de la lago lule frapetis fiŝŝipojn.

Rigardante senliman akvon kunligiĝantan kun la ĉielo en malproksimo, mi demandis amikon: “Kie troviĝas la urbeto Honghu, kiun ni volas viziti?” Li respondis kun rideto: “Sur la lago, kompreneble.”

MIGRADO DE FIŜISTAJ FAMILIOJ

Honghu en sudorienta Hubei-provinco, Ĉinio, estas la plej granda lago de la provinco. Samkiel nomadoj, la fiŝistoj sur la lago vivas sekvante fiŝarojn.

Kun fremda akĉento maljunulo Wu Shaobao diris al mi, ke antaŭ pli ol 30 jaroj lia tuta familio el 6 membroj migris

sur floso el la lago Hongze de Jiangsu-provinco. Dum migrado ili kaptis fiŝojn kaj interŝanĝis la superfluaĵn kontraŭ ĉiutagaj necesajoj kun loĝantoj ĉe la bordo. Du monatojn poste ili atingis la lagon Honghu, dum la avo de la maljunulo migris el la lago Weishan de Shandong-provinco en Jiangsu. Do, neniu povas ĝuste diri, kie estas hejmloko de la familio Wu. 4 000 fiŝistoj sur la lago Honghu plejparte havas tian familian historion same kiel Wu.

De kie ajn la enmigrantoj venis, Honghu-anoj rigardas ilin kiel najbarojn, ĉar eble la prauloj iam kaptis fiŝojn sur la sama lago. Maljunulo Wu memoras, ke li kaj liaj familianoj atingis la lagon en frosta vintro. Honghu-anoj donacis al ili vatitajn vestojn kaj litkovrilojn, dirante: “Restu ĉi tie. La lago Honghu abundas je fiŝoj kaj lotusradikoj. Se oni kolektas lotusradikojn 3-4 tagojn, oni povas aĉeti boaton kontraŭ la

kolektitaj lotusradikoj.” Pro tia simpla sincereco la familio Wu ekloĝis sur la lago.

La tieaj fiŝistoj estas gastamaj. Oni ne scias, kiam formiĝis sur la lago jena kutimo: la familio devas hisi flagon sur sia ŝipo, se gastoj vizitas ĝin. Vidinte la flagon de malproksime, la najbaroj preparas pladon por donaci al la gastiganta familio.

FORPASINTA TEMPO

Kvankam la lago Honghu kun areo de 402 kvadrataj kilometroj ne estas granda, tamen ĝi ankoraŭ ŝajnis al mi maro. Sed la maljunulo Wu veis: “La lago multe malgrandiĝis ol kiam mi venis.”

Jes. Ju pli multiĝis enmigrintoj sur la lago, des pli malmultiĝis fiŝoj en la lago. Do, oni devigite faris polderigon, sed la rikolto estis malbona. Herboj invadis la kampojn, kaj sedimentis granda kvanto da

ŝlimo.

Antaŭe oni diris: “Loĝante sur lago, vivtenu per la lago.” Vivante pli kaj pli malriĉan vivon, fiŝistoj ekkomprenis, ke ankaŭ la lago bezonas flegadon. Montrante tramelojn fiksitaĵn per bambustango sur la lago, lokano diris al mi, ke nun ili bredas en trameloj ĉiovorajn kaj herbovorajn karpojn. Tio ne nur evitigas marĉiĝon de la lago, sed ankaŭ liveras sterkon por trapo kaj lotuso. Kelkajn jarojn poste nature formiĝis “bioĉeno”.

Tia bredado finis la migradon de Honghu-anoj. Ili ankris sian fiŝŝipon ĉe trameloj. Somere ili kolektas herbojn per malgranda boato kaj ekde julio ili bredas fiŝojn en trameloj per rizo. En rikolta sezono antaŭ la nova jaro fiŝoj estas grasaj kaj fiŝistoj — okupitaj. En ĝojo de riĉa rikolto, ili kantas “grotreskan kanton” en komika tono:

“Vento blovpelas ŝtonojn sur
bordon de la lago,
Neston mi faras por birdoj
en sino de la lago,
Fiŝoj metas ovojn sur pinto
de acero,
Fiŝojn kaptas kormorano
sur arbo.”

La kanto cirkulis de la lago Dongting en najbara provinco. Antaŭe la tieaj fiŝistoj bredis kormoranojn por kapti fiŝojn. Oni intence inversigis la sencon por sin amuzi per kantado.

Maljunulo Wu diris, ke ju pli fiŝkaptado estis peniga, des

pli fiŝistoj emis kanti. Somere, kiam la suno bakis, ili kantis la kanton “Sunumado”; vintre, kiam la glacia akvo penetris en vatitan veston, ili kantis la kanton “Frosto”. Dum fiŝkaptado en malproksima rivero ili ne nur faris preĝadon en ĉiuj temploj, kiujn ili renkontis, sed ankaŭ kantis la kanton “Sturmi Danĝerajn Malprofundaĵojn”, embarasite de danĝeroj. Tiutempe ofte okazis akcidento dum tempesto, pro tio ĉiuj fiŝistaj familioj kultis bodisatvon sur la ŝipo.

Forpasis la peniga tempo kune kun la malnova fiŝreto, kiun fiŝistino riparadis. Kiam la fiŝreto teksita per maŝino anstataŭis la manfaritan, nur la kanto “Teksado de Fiŝreto” restas en la memoro de maljuna avino.

KURANTAJ MOROJ

Edzino de frato de maljunulo Wu bonvenigis min antaŭ la pordo de la kajuto. Tiu 50-jara virino ankoraŭ tenas la hararanĝon, kian ŝi tenis ĉe sia edziniĝo. Eble ŝi ŝatas kanti la malnovan kanton “Teksado de Fiŝreto”, mi pensis. Sed ŝia filino apartenas al nova generacio, kiu ŝatas popmuzikon, kaj volas edziniĝi al la bunta mondo ekster la lago.

Fakte, ankaŭ fiŝistoj kredas, ke ilia radiko estas sur la tero. Antaŭ longe, praulo faris boaton,



Alilandaj turistoj sur la lago

kondukis la gefilojn kaj komencis longan flosadon. Kvankam de tiam ili restas de generacio al generacio sur akvo, tamen ili gardas ankoraŭ la geedziĝan moron similan al tiu de loĝantoj sur bordo de la lago: bonvenigi la novan edzinon per palankeno. Sur bordo oni portas palankenon per homoj kaj sur akvo oni portas ĝin per boato. Kaj mortanto certe atentigas siajn posteulojn, ke li nepre estu enterigita. Post forpaso de la patro, la fratoj Wu, laŭ la familia kutimo, genue gardis la mortinton tri tagojn kaj tri noktojn, poste elektis bonaŭguran tagon kaj enterigis lian cindron surborde.

Wu Shaoquan, frato de maljunulo Wu, ŝanĝis sian koncepton pri sepultado, opiniante, ke oni devas bone kaj tutkore flegi la maljunulojn kiam ili vivas, sed ne necesas la genua gardado post ilia forpaso. Li iam kredis je Budaismo. Tri jarojn antaŭe li konvertiĝis al Kristanismo kaj estis baptita sur la lago.

Aŭdiĝis krio. La mastrino diris, ke venis kolportista ŝipo. Dank’ al tia “vendejo sur lago” la fiŝistoj ne plu bezonas veturi longan vojon al fora urbeto por aĉeti bagatelaĵojn kiaj butonoj. Sur tiu ŝipo troviĝas viv-



Kolektado de herboj sur la lago

Foto de WANG XIN

necesaĵoj, legomoj, fruktoj kaj tre diversaj manĝaĵoj. La etvendistoj estas afablaj kaj la klientoj povas libere elekti la bezonaĵojn, marĉandi kun ili, kredite aĉeti aŭ interŝanĝi fiŝojn kontraŭ varoj...

Intertempe nepino de la mastro vekigis. La 18-monata bebo estis alligita al la ŝipo per rubando. Oni tiel faras al infanoj ekde ilia naskiĝo, por ke la bebo ne falu en akvon. Antaŭe la rubando ŝajne simbolis, ke dum la tuta vivo la bebo estos nedisigebla de fiŝŝipo. Sed nun estas alia afero. Kiel siaj gefratoj, ankaŭ ŝi vizitos elementan lernejon sur ŝipo, surbordiĝos por esti internulo de mez- kaj altlernejo, fine labori kaj vivi sur la bordo. Tio ne malhelpos al ŝi esti moderna fiŝistino kiel tiuj gefiloj de fiŝistaj familioj, kiuj viglas kiel "magnato de krabo" aŭ "magnato de molŝela ĥelonio". Ili skribos novan paĝon de fiŝista historio.

Mi demandis la 63-jaran Wu, ĉu li vivos sur bordo kune kun siaj genepoj. Li respondis: "Mi ne kutimas al la vivo sur la bordo." ■



Foto de LE PING



Drak-boata konkurso sur la lago



Foto de ZHU QINGYUAN

Kiel maljunuloj tenu junecon de sia cerbo?

Kadukiĝo en psikologio akcelas kadukiĝon de fiziologio, kaj manko de cerboĉeloj kaŭzas malpliĝon de spriteco kaj malvigliĝon de memoro



Ludo de ĉina ŝako

de YANG WEN

SCIENCISTOJ ekzamenis 1 583 homojn 25-92-jarajn pri iliaj komprenpovo kaj memoro kaj trovis, ke kvarono de la ekzamenitaj maljunuloj pli-ol-80-jaraj havas kapablojn en komprenado kaj memoro egalajn al tiuj de junuloj, kaj kelkaj eĉ superas junulojn. Scienca esplorado montris, ke ĝenerale cerboĉeloj de maljunuloj kuntiriĝas, sed ne mortas grandkvante, tial ne ĉiuj maljunuloj perdas spritecon de cerbo kaj lertecon en agado. Kial do tiel granda diferenco troviĝas inter maljunuloj?

Oni trovis, ke perdiĝo de

vivcelo kaj malbona vivkutimo estas ĉefa kaŭzo de malspriteco kaj mallerteco de maljunuloj. Iuj maljunuloj opinias, ke pro maljuniĝo ili devas multe ripozi anstataŭ konstantaj cerbumado kaj sportado. Tia psikologia inerteco kaŭzas fiziologian kadukiĝon, cerboĉelan kadukiĝon kaj malpliĝon de spriteco kaj malvigliĝon de memoro.

Kiel maljunuloj povas esti sanaj kaj viglaj spirite kaj psikologie? La tradicia ĉina medicino kaj moderna medicino proponas, ke ili

1. Kutimiĝu al legado kaj pripensado, ĉar interesaj novaĵoj kaj artikoloj povas bone eksciti la cerbon kaj utilas al la

inteligento.

2. Rigardu filmon aŭ televidan filmon rezonigan kaj pripensigan kun malsimplaj intrigoj por bone ekzerci la cerbon.

3. Havigu al si hobion en multaj kampoj kaj ankaŭ junulan temperamenton. Kaj ili povas fari ian infanan ludon, ekz. fari rebuson kaj puzlon kaj ludi lignokubetojn kun infanoj, ludi muzikilon, pentri, skribi, ludi kartojn aŭ ŝakon.

4. Ofte partoprenu aktivadojn. Tio donas al maljunuloj pli multe da ŝancoj amikiĝi kun aliaj kaj vigligi sin.

Fakuloj diris, ke ofta kontakto kun homoj saĝaj kaj spritaj estas utila al la cerbaj nervoj.

5. Faru konvenan sporton. La pezo de cerbo konsistigas nur 2% de tiu de la korpo, sed ĝi bezonas 20% de la oksigeno bezonata de la tuta korpo kaj eĉ 32% dum cerbumado. Konvena sportado estas utila al koro kaj pulmoj, prokrasto de sklerozo de cerbaj angioj kaj vigligo de pensado.

Krome, regula vivo, sufiĉa dormo, konvena dieto, bona animstato, optimismo, harmoniaj familiaj rilatoj, ĝojo kaj sindeteno de cigaredo kaj alkoholaĵo... ĉio tio estas utila al prokrasto de cerba inerteco. ■

Sentimentalaj belulinoj

La beleco de kvieto kaj tiu de virinoj posedas la forton skuantan


de PANG NAIYING

ĈINAJ pentraĵoj pri antikvaj belulinoj kutime prezentas tiujn virinojn, kiuj en longa robo aŭ kolektas morusfoliojn ĉe kampara vojeto, aŭ ĝuas lotusflorojn ĉe lageto, aŭ rigardas la lunon ĉe fenestro, aŭ ludas kun lampiroj frapetante ilin per malgranda silka ventumilo... Ili estas belaj, mildaj kaj kvietaj, tamen sur ilia vizaĝo legiĝas melankolio delikata. Pentristo Li Ming lerte kombinis iliajn belecon kaj melankolion en siaj pentraĵoj.

Ĉu ilin ne povas ĝojigi eĉ la aŭtuna luno, printempaj floroj, bela tempo kaj ĉarma pejzaĝo? Ne. Kvankam tiuj belulinoj en la feŭda socio ĝuis riĉan kaj komfortan vivon, tamen ili, katenitaj de la feŭda etiko, ne havis liberecon de amo. La fundo de ilia koro estis premata de melankolio nedispelebla. Antikvuloj emis komponi poemojn kaj pentraĵojn pri tiaj virinoj. La klasika literaturo multe inspiris Li Ming, kaj tiuj sentimentalaj belulinoj iris el la poemoj en liajn pentraĵojn.

Bai Juyi (772-846), fama poeto de Tang-dinastio (618-907) priskribis en sia poemo "Printempaj versoj" virinon, kiu, sin apogante sur balustrado, estas iel melankolia en printempa tago. Poste, lia amiko Liu Yuxi daŭrigis la priskribon pri tiu virino en sia verko, ke ŝi finfine eldomiĝis post tualetto por promeni ekstere kaj ĝui la printempon, sed la korto estis profunda kaj la pordo ŝlosita, do ŝi povis fari nenion alian ol kalkuli florojn en la korto por pasigi la tempon. Tiam libelo haltis sur ŝia

harpinglo... Sub la peniko de Li Ming, tiu juna virino aspektas pli ĉarma inter peonioj. En la pentraĵo la peonioj reliefigis kaj ŝian belan vizaĝon kaj ŝian animon plenan de melankolio. Ĉar peonio floras tre mallongan tempon malgraŭ ke ĝi estas rigardata kiel floro de riĉeco kaj nobleco, ĝi facile sentigas al sentimentalaj antikvulinoj, rapidan forpason de la juneco. Por tiu pentraĵo Li Ming uzis varmajn



S-ro Li Ming

kolorojn kaj eĉ la libelo, simbolo de la soleco de la virino vivanta en buduaro, estas en ruĝa koloro, eble per tio la pentristo faris kontraston kun la animstato de la persono en la pentraĵo.

La pentraĵo "Aŭskulti pluvon" prezentas bildon: En densa nebulo junulino kun ventumilo, sidanta apud roko en kvietaj bambuaro, absorbiĝas en aŭskultado vizaĝe al baŝooj. Kion ŝi aŭskultas? Han Yu (768-824), poeto de Tang-dinastio, respondis la demandon per siaj versoj: "Ne forgesu de nun, mia kara, ĉiun pluvan tagon, ni aŭskultu pluvon frapi sur foliojn tian tagon." De tio oni scias, ke ŝi iam havis tie rendezuon kun

sia amato. En pluveta tago ili interkonsentis, ke ili intervidiĝos en la venontaj pluvaj tagoj. Sed tiam nur ŝi sola aŭskultas pluvon, sidante en kiosko. Ĉu ŝi venis tro frue aŭ li ne plu amas ŝin, aŭ fakte ne pluvas kaj ŝi aŭskultas "pluvon" en senpluva tago, ege ĉagreniĝante pro sopiro al la amato? La pentraĵo estas tre imagiga.

Kiam la belulino en la pentraĵo "Agrabla muziko" tuŝas per siaj graciaj fingroj la kordojn de la instrumento, ankaŭ la penso de la spektantoj kirligigas. Ŝi, en blanka robo el gazo, sidas dorse al pirujo kun blankaj floroj. Sur ŝiaj fingropintoj flirtas agrabla muziko kiel lirlanta akvo. Ŝajnas, ke la tuta bildo estas travidebla. Evidente, la pentristo prezentis, per iluziaj linioj kaj lirika blanka koloro, talentan belulinon virgan, noblan, virtan kaj sentimentalan.

Troviĝis multaj tiaj virinoj en la antikva Ĉinio. Inter ili estis Ban Zhao (49-120). Ŝiaj patro kaj frato tre famis kiel historiografoj de la Orienta Han-dinastio (25-220), kaj ŝi, erudicia pri historio kaj lerta en komponado de poemoj kaj prozaĵoj, povis rivali kun ili. Kiam la frato mortis sen fini sian libron "La Historio de Han-dinastio", kiun li skribis pli ol 20 jarojn, ŝi daŭrigis la libroverkadon kaj plenumis tiun historian monumentan verkon. La pentraĵo de Li Ming "Ban Zhao verkas libron" prezentas la trajtojn de tiu antikva talentulino. Starante ĉe la tablo, ŝi atente legas kun miemo bela, sed ne melankolia, ĉar ŝi kun grava misio absorbiĝis en legado kaj skribado, ne havante tempon por maĉi siajn ĝojon kaj melankolion.

Estas interese, ke Li Ming enamiĝis al pentrado pro humuro de sia instruisto en mezlernejo, kaj lia unua pentraĵo pri homa figuro ne estis tiu pri antikva belulino.

Tio okazis en historia leciono. Montrante la kranion de pekina prahomo, la instruisto diris: "Vidu, ĉu mia vizaĝo ne similas al tiu de pekina prahomo kun elstaraj brovaj arkoj, mallarĝa frunto, granda buŝo, longa filtrumo...?" La lernantoj



"Post granda pluvo"

"Ban Zhao verkas libron"

ridis. Li Ming pririgardis la instruiston — estis la unua fojo por li tiel atente observi lian aspekton. "Jes, li ege similas al prahomo." Tuj Li Ming ŝtele faris portreton de la instruisto. Neatendite, ĉi tiu rimarkis la portreton. Li Ming falis en embarason, ne sciante kion fari. Sed la instruisto ridegis anstataŭ lin riproĉi: "Vi bone faris la portreton! Estu diligenta, kaj vi sukcesos estonte!" Ekde tiam, Li Ming, elstara en matematiko, fiziko kaj kemio, amas ankaŭ pentradon.



"Agrabla muziko"

Sed estas malfacile kompreni, ke Li Ming fariĝis delikatlinia pentristo, ĉar nuntempe tre malmultaj homoj studas ekskluzive tian pentradon pro tio, ke ĝi postulas grandan paciencon, lertecon kaj sperton, kaj unu fuŝlinio povas damaĝi la tutan pentraĵon. Tamen Li Ming povas elteni solecon kaj restas ĉiam indiferenta antaŭ diversaj

allogoj. Kiam aliaj ĉesas tujan efikon, li pentras linion post linio la absolutan belecon en sia koro. La haroj de antikvaj belulinoj estis pentritaj de li unu post alia; por evidenti la travideblecon de la ŝalo el gazo sur la ŝultroj de knabinoj, li lerte uzis la kolorojn kaj klare vidigis la plisaĵojn de la vesto sub la ŝalo; sub lia peniko plektaĵoj sur la seĝo el liano distingiĝas per siaj vejnoj sen ajna fuŝeto. Li strebas al perfekteco. Efektive, li perfektigas ne nur sian pentrarton, sed ankaŭ sian personecon.

Li Ming diris: "Kvieteco estas la ĉefa karaktero de miaj pentraĵoj, ĉar mi opinias, ke la beleco de kvieto kaj tiu de virinoj posedas la forton skuantan." Vere, kiom ajn moviĝema oni estas, oni povas fariĝi kvieta, rigardante la pentraĵojn de Li Ming, eĉ se oni ne komprenis la signifon de liaj pentraĵoj nek legis la melankolion kaŝitan post la beleco. ■





Por ke ĉiuj estu foraj de malriĉeco


Kvankam pli kaj pli malmultiĝas la nombro de malriĉuloj, tamen la laboro por solvi la problemon de minimuma vivnivelo fariĝas pli kaj pli malfacila

de WANG HANPING

JAM estas la nova jarcento, sed ankoraŭ 1.3 miliardoj da homoj en la mondo vivtenas sin per malpli ol 1 usona dolaro por ĉiu tago. Kaj en Ĉinio, laŭ statistiko, ĝis la fino de 1998, 30 milionoj da homoj vivis tian vivon. Hua'nan en Heilongjiang-provinco ja estas unu el la malriĉaj gubernioj.

En ora aŭtuno de 1999, grupo el 5 raportistoj de la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo venis al la gubernio por ĉeesti la "Orkukurban Festivalon". Nia grupo vizitis la gubernion ne sole pro la ĵurnalisma devo, sed ankaŭ pro la aparta "parenceco" de la buroo kaj la gubernio.

La ĉinoj, kiuj ankoraŭ ne solvis la problemon de minimuma vivnivelo, loĝas plejparte en montaraj regionoj kun malbona natura medio en la mezo, okcidento kaj landlimaj regionoj de Ĉinio. La gubernio Hua'nan situas en la nordorienta parto de Heilongjiang-provinco. Ĝi, kun areo de 4 415 kvadrataj kilometroj kaj 426 miloj da loĝantoj, estas parto de la fama Norda Sovagejo kaj havas avantaĝon en forstokultura industrio, minekspluatado kaj agrikulturo. Tamen tie ofte okazas



En la klasĉambro de la elementa lernejo "Espero" investita de la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo

katastrofoj pro sekeco, inundo, hajlado, frosto k.s. Krome, pli kaj pli malboniĝas la ekologia medio de la agrikulturo kaj la lokanoj suferas de endemio, tial la nivelo de ilia vivo estas malalta. Antaŭ 20 jaroj la kamparanoj eĉ ne povis akiri minimuman porcion da greno. Kvankam iom boniĝis la stato en la pasintaj 20 jaroj, tamen ankoraŭ 40 miloj da kamparanoj vivas sub la minimuma nivelo. Sekve la gubernio fariĝis unu el la plej malriĉaj gubernioj nepre helpataj de la ŝtato.

Reformado kaj pordomalfermo ja celas riĉigi parton de la ĉinoj, kaj poste tiu parto helpu la aliajn por kune iri sur la vojon de riĉiĝo. Por helpi la popolon en malriĉaj lokoj forskui malriĉecon, la ĉina registaro komencis grandan laboron en la mezo de la 80-aj jaroj. Pro tio la Ŝtata Konsilio fondis la

Gvidan Grupon de Helpado kaj Disvolvado, kaj elmetis al si la taskon fundamente solvi la problemon de minimuma vivtenado de malriĉuloj en la kamparo en la fino de la jaro 2000. Reformado, pordomalfermo kaj helpado multe moderigis la malriĉecon en la ĉina kamparo, kaj la nombro de malriĉuloj malmultiĝis de 250 milionoj da homoj en 1978 al 30 milionoj en 1998, kaj la procentoj de malriĉuloj reduktiĝis de 26% al 2.4%. Kvankam pli kaj pli malmultiĝas la nombro de malriĉuloj, tamen la laboro por solvi la problemon de minimuma vivnivelo fariĝas pli kaj pli malfacila, kaj la laboro de helpado venis en la ardan stadion. En tiaj cirkonstancoj la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo estis taskita de la Gvida Grupo de Helpado kaj Disvolvado per helpado al la

gubernio. Nun 124 ŝtataj institucioj estis taskitaj per helpado al 334 plej malriĉaj gubernioj (ŝtataj institucioj en interrilatoj kun gubernio; provincaj, subprovincaj kaj guberniaj institucioj en interrilatoj kun malriĉaj subgubernioj kaj vilaĝoj).

Hua'nan estas malriĉa, sed ne ĉiuj familioj estas malriĉaj kaj diferencas la enspezoj de familioj. Tial oni alprenis la metodon "unu helpu unu". Pli ol 2 100 kadroj de diversaj niveloj en la gubernio kaj la familioj, kiuj jam la unuaj forskuis malriĉecon kaj fariĝis bonstataj, estis postulataj helpi pli ol 2 500 malriĉajn familiojn. Ili fariĝis "parencoj" de la malriĉaj familioj kaj vizitadis ilin por helpi ilin solvi la malfacilojn en produktado kaj vivtenado. Dank' al tio centoj da familioj jam solvis la problemon de minimuma vivtenado kaj centoj da familioj jam fariĝis bonstataj.

Samtempe kun helpado al la malriĉaj familioj en solvo de la problemo de minimuma vivtenado, la laboro de Ĉinio por helpado akcentas ankaŭ disvolvado, nome doni favoran politikon kaj monon, kuraĝigi ilin disvolvi produktadon de varoj kaj grandigi la kapablon mem disvolvi, por unue solvi la problemon de vivtenado kaj poste bonstatigi sin.

Tuj ĉe la ricevo de la tasko helpi gubernion Hua'nan, la Ĉina Fremdlingva Eldona kaj Distribu Buroo establis kabineton de helpado, sendis delegitojn por esplori la lokon. Unue la buroo akiris de siaj subaj institucioj unuan helpmonon por kiel eble plej baldaŭ elekti subtenotan punkton. La delegitoj vizitis malriĉajn vilaĝojn kaj malriĉajn familiojn, donacis al ili monon kaj asignis monsumon por konstrui elementan lernejon "Espero". Sed la buroo ne havas multe da mono kaj metas la gravitan punkton de helpado sur disvolvado. La buroo inter-

konsiliĝis kun aliaj helpantaj institucioj, ekzemple la provinca Banko de Komunikado kaj la Harbina Inĝenieria Universitato, respektive kunlaboris kun ili laŭeble utiligante siajn avantaĝajn kapablojn. La banko pruntedonis monsumon al la loko, la universitato kulturis teknikistojn kaj la buroo presis broŝurojn kaj albumojn diskonigantajn la gubernion. La buroo kaj multaj aliaj helpantaj institucioj ĉeestis la Unuan Orkukurban Festivalon. La grandiozece kaj la imponeco de la festivalo donis esperon al la lokanoj.

En la gubernio oni kulturis sojfabon, maizon kaj kukurbon. Antaŭe kukurbo estis la ĉefa nutraĵo en la loko kaj la kam-

subskribis kontrakton kun ili pri aĉeto de iliaj kukurboj je interkonsentita prezo. Dank' al tio parto de la malriĉaj kamparanoj jam liberigis sin de malriĉeco. Oni sekigas kukurbajn florojn kiel legomon kaj faras el kukurba suko trinkaĵon por diabetuloj, dum la kukurbaj semoj havas grandan debiton en 42 landoj kaj regionoj. Jen kial la popolo de Hua'nan nomas kukurbon "ora kukurbo". La sperto de la gubernio en prilaborado de kukurbo inspiris la periferiajn guberniojn. Lastatempe la gubernio estis nomunita "kukurba gubernio de Ĉinio".

La "Orkukurban Festivalon" ĉeestis ne nur raportistoj, sed



En la prilaborejo de kukurbaj semoj

paranoj estas tre spertaj en kulturado de bonkvalita kukurbo. La plej granda kukurbo pezis 50 kilogramojn kaj la semoj estas grandaj kaj bongustaj. Tio inspiris la popolon de Hua'nan. Oni fondis kompaniojn de prilaborado de kukurba semo kaj kukurba suko. Kun la kompanio de kukurba semo kiel la spino, formiĝis la industrio de kukurba prilaborado. Multaj kamparanoj de la gubernio kulturis kukurbon, kaj la kompanio (grupo)

ankaŭ en- kaj eksterlandaj komercistoj. Dum la festivalo oni subskribis kontraktojn en totala valoro de 400 milionoj da juanoj. La gastoj vizitis la kompanion de kukurba semo kaj ekspozicion de kukurbaj produktaĵoj. Vespere la gastoj estis invitataj al la aprecado de subĉiela varieteo. Programeroj kun la temo de kukurbo altiris dekmilojn da rigardantoj, kiuj esperas sin liberigi de malriĉeco pere de industrio de kukurba prilaborado. ■



Ĉemara urbo Dalian



Logkvartalo



Kontenera kajo ĉe Dayao-golfo



Golfoludo



Tramo en la urbo

Teksto de LI XIA

Fotoj de YU XIANGJUN

Situanta ĉe la suda fino de la duoninsulo Liaodong de Ĉinio, Dalian estas fama industria, komerca kaj turisma urbo.

Dalian estis malgranda fiŝvilaĝo antaŭ cent jaroj. Kiam vi promenas surstrate en Dalian, vi tuj logiĝas de peco kaj peco da verdejoj, gustoplenaj placoj, elegantaj konstruaĵoj, modernaj domoj kaj transformitaj tramoj. Vi certe vidos la rideton de lokanoj. Ĉio ĉi spegulas la viklecon de la ĉemara urbo.

Larĝaj
stratoj kaj
altaj
etaĝdomoj





Prezentado en la fason-festivalo

Sur plaĝo





Lastaj fekportistoj

Teksto kaj fotoj de JIAO BO

En Pekino troviĝas pli kaj pli da altaj domoj, tamen ankoraŭ estas multaj kvadrataj kortoj kun pekina stilo. Tie vidiĝas ankaŭ malnova fekportado. La fekportistoj kun ligna sitelo sur la dorso laboras en fiksitaj horoj sur stratetoj.

Fan Baofa, estro de la fekportista grupo, estas premiito de "Landnivela Labor-medalo de la Unua de Majo". Li, 40-jara, estas viro fortika kaj ridema. Kun rapida disvolviĝo de la rekonstruado en Pekino post nelonge malaperos la laboro de li kaj liaj kolegoj, sed ili ne timas la eblan senlaborecon. Ĉiutage ili diligente faras sian laboron.

Jen fekveturilo atingas iun strateton. S-ro Fan kaj liaj 4 kolegoj saltas sur teron, kaptas la sitelon kaj eniras en

kortojn. Pleniginte la sitelon per fekaĵo, s-ro Fan profesie etendis dekstran piedon, kaŭris, streĉis siajn krurojn kaj levis la sitelon, 80 kg. pezan, surdorsen, kaj tuj eliris el la korto. Vidinte ilin sur la strato, iuj ŝirmas sian nazon

kaj rapide foriras, tamen tieaj loĝantoj ofte danke salutas ilin.

Post sunleviĝo, la fekportistoj finas la laboron. En la fekveturilo ili sentas grandan ĝojon, rigardante la belan urbon.



Paŭzo





1	2
3	5
4	

1. Post laborado
2. Fan Baofa (subtere) kaj liaj kolegoj laborantaj por drenado de subtera fekajkonduka kanalo
3. Fan Baofa preta por la laboro
4. "Kial vi tuj foriras, eĉ ne trinkinte ĉason da akvo?"
5. Renkontiĝo sur mallarĝa strato



Brilinta verda stelo

- Lia Esperanta nomo Jariĉ venis de admiro de amiko: "Ho, ja riĉe!"
- Li stafete korespondis kun la tri generacioj de germana samideano

de SHI CHENGTAI

LA 4-an de septembro 1999 en Ĉinio falis hele brilinta verda stelo — nia sincera samideano Jariĉ forpasis, tio ja estas granda domaĝo por la ĉina Esperanto-movado!

Jariĉ naskiĝis en 1937. Kiam li studis la anglan lingvon en universitato en 1956, li eklernis Esperanton. Lia propra nomo estas Yang Zongkun, kaj Jariĉ estas lia nomo en Esperanto, kies deveno ja estas anekdoto: Dum la kultura revolucio (1966-1976) li laboris en la urbo Wuhan, Hubei-provinco, lia hejmloko, kiel instruisto en mezlemejo, s-ano Guozhu, vizitis lin en lia hejmo. Tiam en Ĉinio ne viglis la Esperanto-movado, kaj studado de Esperanto, Esperanta renkontiĝo kaj korespondo kun fremdlanda samideano estis rigardata peko, sed li rezervis diskon en Esperanto, flageton kun verda stelo donacitan de fremdlanda korespondanto, duonon da Jarlibro de UEA kaj ekzempleron de "Esperanto", organo de UEA! Surprizite, Guozhu kriis: "Ho, ja riĉe!" De tiam Yang por si mem prenis la Esperantan nomon Jariĉ.

Jariĉ, entuziasma esperantisto, kredis kaj praktikis la instruon de Zamenhof — la animo de Esperanto estas la korespondo. Troviĝis tra la mondo liaj korespondaj amikoj, inter kiuj estis olduloj pli ol okdek-jaraj kaj eĉ knaboj. En la ĉina Esperanto-movado oni konis anekdotojn pri lia korespondado: li stafete

korespondis kun la tri generacioj de la germana s-ano Herman Theobald; starigis amikecon kun Hugo Steiner, iama direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, havis amikan korespondadon (kaj poste reciprokaj vizitoj) kun Otto Nitsche, prezidanto de Esperanto-Asocio de Duisburg, Germanio, akcelis la ĝemelan interligon de du urboj Duisburg kaj Wuhan; pere de la Esperanta korespondo li sukcese akcelis interfluan de la medicina scienco de ĉinaj kaj japanaj kuracistoj... ĉinaj s-anoj nomis lin koresponda ambasadoro por interpopola amikeco.

Pli laŭdinde estas, ke samideanoj en Wuhan ĉiujare celebris Zamenhof-feston, eĉ dum la kultura revolucio en la hejmo de Jariĉ! Ili mallevis fenestrajn kurtenojn, pendigis portreton de Zamenhof kaj flagon kun verda stelo sur muro. Ili ĉiuj portis insignon kun verda stelo. Ili kantis la himnon la Espero, prelegis kaj diskutis. En 1978 samideanoj okazigis Uhan (Wuhan)an Kolokvon en la hejmo de Jariĉ por bonvenigi alvenon de printempo de Esperanto-movado en Ĉinion. Ilia foto aperis sur la kovrilo de februara numero, 1979, "Esperanto", kun instiga titolo: Ĉinoj (re)venas! Sur la foto Jariĉ meze sidas, tenante flagon kun verda stelo. Eĉ ili nomis sian kolokvon eta UK, revante ĉeesti la Universalan Kongreson iutage.

Ŝanco fine alvenis. La 71-a UK okazis en Pekino en 1986, kvankam laŭ la regulo de UEA iu ajn, nur paginte la kotizon,



Jariĉ (la tria de maldekstre en la dua vico)

rajtas ĉeesti la kongreson, tamen la tiama LKK en Ĉinio limigis la nombron de ĉinaj ĉeestantoj, ve, Jariĉ estis ekster la ĉeestantoj, tio multe doloris tiun ĝisostan esperantiston, kiu ĉiam aktivis en Esperanto-movado. Sed lia germana koresponda amiko pagis por li UK-kotizon per markoj ĉe CO de UEA, kaj ankaŭ Jariĉ venis en Pekinon.

La epoko antaŭenmarŝas. Poste Jariĉ ĉeestis la 72-an UK en 1987, okaze de la centjara jubileo de Esperanto. Li, malriĉa ĉina instruisto, ne povis vojaĝi per aviadilo, do decidis veturi per trajno tra Siberio kaj Moskvo. Tamen, kiam li ricevis vizon, la tempo jam ne sufiĉis, eĉ pli malfeliĉe estis, ke biletoj por la lasta trajn-veturo antaŭ la kongreso jam estis elĉerpitaj! Li atendadis ĉe giĉeto de la stacidomo en Pekino. Ĉu iu redonus bileton? Ho, ĉielo! Li finfine ricevis unu bileton, kiun

BEJA ESPERANTO-SEMINARIO
届世界语文化与教学研修班



redonis la edzino de la hispana ambasadoro en Ĉinio! Li kunveturis kun la hispana ambasadoro dum semajno, kaj lia vigleco kaj sincera esperantisteco kortuŝis neesperantistan kunvojaĝanton. Sed kiam li atingis Varsovion, al la kongreso restis unu tago, li nur ĉeestis la fermon, kaj kun larmoj portis la kongresan insignon n-ro 5964 sur la brusto, dirante: "Mi kredas, ke mi estas la lasta kongresano, kiu venis el fora Ĉinio. Mi fieras, ĉar por celebri la centjaran jubileon de nia lingvo, mi venis!"

Li ĉeestis ankaŭ UK en Roterdamo en 1988. Li sin preparis por ĉeesti la 84-an UK en Berlino, eĉ deziris ĉeesti Internacian Esperanto-Konferencon en Metz. Sed li ne povis, la terura kancero katenis lin sur lito en hospitalo.

Li estis simpla ĉina intelektulo, tamen brava batalanto

por Esperanto. Dum la kultura revolucio li eble restis unika individua membro de UEA en Ĉinio kaj persistis en korespondo kun fremdlandaj s-anoj. Lia letero al UEA estis eksponata, kiel specimeno de ĝia ĉina membro.

Li instruis Esperanton en multaj kursoj, liaj lernantoj troviĝas tra la provinco, eĉ tra la lando. Li estis ankaŭ serioza kaj fidela laboranto por Esperanto, diligente laboris por nia movado dum la tuta vivo. Kiel kasisto de la Hubei-a Esperanto-Asocio, li klare notis ĉiun elspezon en la konto, eĉ tiujn por glaciaĵo kaj por enira bileto por parko. Kiam nia povra revueto "Penseo" eldoniĝis en Wuhan, li prenis laboron de la distribuado kaj fariĝis kasisto de Fonduso Penseo. Por ŝpari monon, li pesis ĉiun koverton kun revuo por eviti troŝarĝon...

Li estis membro de UEA,

ILEI, komitatano kaj vicprezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio. Por la amikeco kaj la interkompreno inter la popoloj li senparade klopodadis kaj oferis sin. Lastatempe li havis novtipan komputilon pli bone servantan al lia korespondo. Ĉiutage li ricevis multajn ret-leterojn el diversaj lokoj de la mondo... Neatendite li tiel rapide foriris!

Ĉi-momente sonas la parolo de d-ro Zamenhof: "Ne ĉiuj e-istoj scias, kiom multe nia afero ŝuldas al nia kara foririnto. Venos la tempo, kiam ĉiuj e-istoj ekkomprenos, kiel gravega estis lia laboro. Al la nekonsolebla edzino kaj al ŝiaj gefiloj mi povas certigi, ke en la mondo de la e-istoj la memoro pri la kara foririnto neniam mortos." Ŝajnas al mi, ke la parolo de nia majstro estas dediĉita al nia Jariĉ! ■

La mondo en la manoj de junuloj

Wang Xuan, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, profesoro de la Pekina Universitato, inventinto de kompost-sistemo por ĉinaj ideogramoj de la Kooperativo (Grupo) Fonder de la Pekina Universitato. Estas li, kiu ekutiligis komputilon en eldonado ĉinlingva. Per komputiloj, sennombraj ĉinlingvaj ĵurnaloj kaj gazetoj nun povas montri pli belajn kaj modernajn paĝojn al la legantoj. Tion oni ŝuldas al Wang Xuan. Pri siaj atingoj li tamen havas tre prudentan komprenon. En la Pekina Universitato li faris jenan prelegon, humuran kaj korverŝan, en kiu li montris esperon al junuloj. En Ĉinio tre populariĝas la vortoj: "La mondo estas via kaj ankaŭ nia, sed finfine estos via. Vi junuloj, plenaj de vivfreŝeco, estas en la tempo de florado, kvazaŭ la suno je la oka aŭ naŭa horo en la mateno. La espero estas metita sur vin." La prelego de Wang Xuan havas la saman sencon.

Yu Tao

de WANG XUAN

MI estas jam 61-jara. Antaŭ kvin jaroj mi ne plu laboris en la fronto de tekniko kaj en la pasinta jaro iom post iom forlasis la administran taskon. Bill Gates diris: "Estas neimageble, ke pli-ol-60-jarulo estu estro de Microsoft." Same, estas neimageble, ke 61-jara maljunulo gvidu la Kooperativon Fonder. Foje anoncisto de la Pekina Televida Stacio petis min priskribi min mem per unu frazo, kaj mi diris: "Mi estas arkaika sciencisto, kiu iam multe klopodis kaj akiris sukceson, kaj nun falis de sur la kulmino kaj ne plu povas sekvi la progreson de nova tekniko."

Iuj aferoj en la mondo estas tre ĉagrenaj kaj komikaj. 26-jara, mi staris en la teknika fronto kaj estis en mia unua kulmino de kreivo, sed oni ne alte taksis min. 38-jara, mi min okupis pri laser-elektronika kompostado por ĉinaj ideogramoj. Mi eltrovis novan teknikan vojon. Tiam oni nomis min teknika aŭtoritatulo, ĉar en tiu kampo mi sciis pli

multe. Sed bedaŭrinde, oni ofte neglektas ordinarajn homojn. Oni kutime donas multon al famuloj, kvankam ili jam havas sufiĉe multe, kaj donas nenion al la senfamaj. Nun oni ŝatas diri: "Sub la gvido de Wang Xuan..." — fakte mi gvidis nenion, la laboron faris aliaj. Kiam mi laboris en

mi ricevis tri titolojn de akademiano. Tio estas stranga. Kio estas akademiano? Se oni pensas, ke ĉiuj aktualaj akademianoj estas aŭtoritatuloj kaj reprezentantoj de sia fako, tio estas miskompreno. Ekz. mi ne estas aŭtoritatulo, ĉar mi estas for de la fronto jam de 5 jaroj.

La komputila tekniko progresas tre rapide, pri tio junuloj havas sian avantaĝon. En la rondo de komputila tekniko malmultas aŭtoritatuloj pli-ol-60-jaraj! (Ridoj, longa aplaŭdado)

Kiam mi fakte estis teknika aŭtoritatulo, tiam tion oni ne rekonis. Kaj nun oni rigardas min kiel aŭtoritatulon, sed mi jam ne plu laboras en la fronto. Lastatempe mi ofte rakontis pri

miaj travivaĵoj en diversaj okazoj, tial oni diris: "Wang Xuan, mi vidis vin en televido!" Mi diris: "Se iu sciencisto ofte aperas en televido, tio signifas, ke lia scienca vivo preskaŭ finiĝas." (Ridoj, longa aplaŭdado)

Tiuj, kiuj laboras en la fronto, tute ne havas tempon por akcepti intervuon. Antaŭ 1992 mi malofte akceptis televidajn intervjuojn. Kaj nun, nia kompanio Fonder



Wang Xuan (meze) kun junuloj

la fronto, tiam oni ne atentis nek rekonis min. Kaj tiam la ŝajnaj "aŭtoritatuloj" ofte "gvidis" min — sed fakte ili konis la teknikon multe malpli ol mi. Mi ne havis la intereson klarigi al tiuj, kiuj ne komprenis min. Ili tute ne sciis kion mi faris.

Kiam mi estis 61-jara, la kulmino de mia kreivo jam pasis. Post mia 55-jariĝo mi ne plu havis novan atingon, sed de 1992



Wang Xuan en laboro

bezonas, ke mi ofte aperu en amaskomunikiloj. Do, tio estas komprenebla. Se junuloj ofte aperas en televido por distrumpeti sin, ili estas senesperaj.

Estas eraro preni mian aŭtoritatecon pasintan por la estanta, eĉ por la estonta — iuj eĉ opinias, ke mi povas orienti la estontecon! (Ridoj)

Kion signifas akademianeco? Estas honora takso al tiu, kiu pene laboris, multe kontribuis al la socio kaj nun estas maljuna. (Ridoj, longa aplaŭdado)

Escepto estas al junaj akademianoj. Pri la komputila tekniko, estas malfacile por maljunaj akademianoj superi la junajn. Tamen pri agrikulturo, arkeologio, medicino k.s. la spertoj de maljunaj fakuloj estas tre gravaj. Ekz. akademiano Yuan Longping aĝas pli ol 70 jarojn, sed nun li havas multajn novajn atingojn en agrikulturo.


Iom post iom mi iĝis famulo. Mia kontribuo malmultiĝas, sed

mia renomo grandiĝas. Kio estas la diferenco inter famulo kaj ordinarulo? Iu artikolo diras: objekto uzita de famulo fariĝas memorindaĵo, tiu de ordinarulo — forĵetaĵo; kiam famulo ĉiamaniere sin pravigas, oni rigardas lian parolon elokventa, sed tiun de ordinarulo — tro obstina; kiam famulo manpremas kun aliaj, oni rigardas lin facile alirebla, sed ordinarulon — flatema; se famulo sin vestas malorde, oni prenas tion kiel stilon de artisto, sed por ordinarulo — malorda; drinkas famulo — heroe kaj brave, ordinarulo — avide kaj aĉe. Konsciente tion, mi nun klopodas teni la animstaton de ordinarulo.

Multaj iniciatintoj de entreprenoj kaj inventintoj estas malpli-ol-45-jaraj. El la tri iniciatintoj de Intel, unu estas 31-jara kaj la aliaj du malpli-ol-40-jaraj. 22-jara junulo lanĉis la kompanion Apple. 19-jara, Bill Gates fondis Microsoft. La

iniciatinto de “Yahoo!” tiam estis nur 29-jara. Ni devas koni la tendencon kaj subteni la junulojn.

Mi tutkore kaj tutforte helpas junulojn. En universitatoj, instruistoj de pordoktoriĝaj studentoj mem estas studentoj kaj komprenas la penadon de junuloj. Tial mi proponas, ke se ili ne multe partoprenis esploran laboron de siaj studentoj, iliaj nomoj ne aperu en la esploraj raportoj de la junuloj. En iuj raportoj ofte legiĝas: “Sub la gvido de Wang Xuan...” Pri tio mi konfesas, ke mi multe ekspluatas la junulojn, sed tio ne estas mia intenco. Bone konante tion, ili restas grandanimaj kaj pardonemaj al mi. (Ridoj) Ni devas doni al junuloj ŝancon kaj puŝi ilin al la fronto. En Ĉinio oni adoras famulojn kaj tro atentis la rangon. Ni devas liberiĝi de tiu kateno. Laŭ mi, subteni kaj helpi junulojn estas konforme al la historia tendenco. ■



Ĉevalo kaj ĉaro

Kolektantino de ludiloj

Teksto kaj fotoj de
LING YOUJUAN

Ĉie en la malgranda apartamento el du ĉambroj de sino Xu Feng vidiĝas diversaj malgrandaj ludiloj de pli ol cent specoj. Ŝi diris, ke ili estas popolaj ludiloj.

La pli-ol-70-jara Xu Feng tiel pasie amas ludilojn kiel infano. Ĉe la litoj, en la ŝrankoj kaj sur la librobretoj, ĉie estas ŝiaj ludiloj. Dum pli ol 40 jaroj ŝi ĉiam en postlaboraj horoj kolektis kaj esploris popolajn ludilojn. Ŝi scias la nomon de iliaj projektintoj, iliajn karakterizaĵojn, stilon kaj historion. Krome, ŝi ankaŭ



Ĉie en la domo estas ŝiaj ludiloj.

mem faras ludilojn, kiaj pupoj. Iuj el la de ŝi kolektitaj ludiloj estas jam 100-jaraj. Ŝi opinias, ke ankaŭ popolaj ludiloj estas grava parto de ĉinaj metiartaĵoj kaj oni ne devas fermi al ili la artan palacon.



Teatraĵo sur telero



Argilaj modlajoj
kaj nefaligebla
pupo



Bonaŭspicia "leporo avo" de Pekino

SONORIGADO KAJ TAMBURADO EN LA JARCENTA ŜANGĜO

39 minutojn post la 23-a horo de la 31-a de decembro 1999, oni frapis 108 fojojn la gigantan tamburon sur la antikva Tambura Turo en Pekino, kaj je nul minuto de nul horo de la unua de januaro 2000, oni sonigis 200 fojojn la gigantan sonorilegon sur la

Sonorila Turo situanta tuj post la Tambura Turo. La tamburado kaj sonorigado daŭris 41 minutojn kaj 10 sekundojn, interligante la du jarcentojn.

La du turoj sidas sur la norda-suda akso de Pekino. Ili estis konstruitaj en 1272 kaj poste dufoje rekonstruitaj pro brulego. La nuna Tambura Turo, rekonstruita en 1420, altas 46.7 metrojn. La duklina tegmento grize tegolita havas tri verdajn alerojn unu super alia. La tamburo en la turo altas 2.22

metrojn kaj ĝia ventra diametro estas 1.71 metroj. La Sonorila Turo estis rekonstruita en 1745, kaj la arkoforma turo konsistas el ŝtono kaj brikoj. Ĝi sidas 100 metrojn norde de la Tambura Turo kaj pli alta ol la lasta je 1.2 metroj. En la supra etaĝo pendas 63-tuna sonorilego farita en Ming-dinastio (1368-1644). La sono de la sonorilo estas tre oreplaa. En antikveco oni sonigadis ĝin matene kaj tamburadis vespere, anoncante la horojn. Ĉu altranguloj, ĉu ordinaraj urbanoj, ĉiuj konis la horojn laŭ la sono de la tamburo kaj sonorilego. Sed en 1924 oni ĉesigis la tamburadon kaj sonorigadon.

En la lastaj jaroj, kiam venis nova jaro, oni denove tamburadis kaj sonorigadis, kaj ĉi-foja sonigado estas la plej longa.

NOVAJ FRUKTOJ EN ARKEOLOGIO

En antikva urbo Xi'an, kie ĉinaj arkeologoj trovis la argilajn legiojn proksime de la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, oni konstruis novan muzeon de Yang-maŭzoleo de Han-dinastio. La maŭzoleo estis konstruita por Liu Qi (188-141 a.K. kaj 157-141 a.K. sur la trono), la kvara imperiestro de Han-dinastio, kaj lia edzino. En la pasintaj 10 jaroj arkeologoj amplekse prifosis kaj esploris la maŭzoleon kaj konstatis, ke la maŭzoleo longas 6 kilometrojn de la oriento al la okcidento kaj larĝas 1-3 kilometrojn de la sudo al la nordo. La maŭzolea regiono rigardas al la oriento kaj konsistas el tomboj de la imperiestro, lia edzino, kulta templo kaj fosoj de oferaĵoj. Kun la tombo de la imperiestro kiel centro, la maŭzolea regiono estas simetria kun suda-norda akso. La strukturo de la maŭzolea regiono karakteriziĝis per evidenta



Sonorigado en la jarcenta ŝangĝo

Foto de LI YUWEI

ideologio de absoluta supereco de la imperiestra familio kaj nekonfuzebla distingiĝo inter la rangoj.

La nove trovitaj 90 fosoj en diversaj grandecoj dislokiĝas ĉirkaŭ la tomboj kadre de la kvar pordoj de la maŭzolea regiono. En la fosoj oni trovis multajn argilajn kavalerianojn, infanterianojn kaj bestojn, armilojn, ĉiutagajn bezonaĵojn kaj lignajn ĉarojn. Estis la unua fojo, ke oni trovis centojn da argilaj kavalerianoj.

La argilaj figuroj altas ĉirkaŭ 60 centimetrojn, iuj en vesto kaj aliaj nudaj aŭ senbrakaj. Antaŭe oni ne trovis la similajn. La arkeologoj kredis, ke tiuj senbrakaj figuroj havis almutablajn lignajn brakojn kaj estis vestitaj kaj farbitaj per la samaj koloroj de la hararo kaj haŭto. Sed pro la longa restado sub la tero, putriĝis la vestoj kaj la brakoj, kaj nun oni vidas ilin nudaj kaj senbrakaj. La koloroj estas freŝaj.

La argilaj bestoj havas tre versimilan formon. Ekzemple, la argila porkino havas peze falantan ventron kun du vicoj da cicoj. La grasa korpo, la longa rostro kaj la malgrandaj okuloj havas tre harmonian proporcion. Krom tio oni trovis ankaŭ spritan hundon, obeeman ŝafon, fieran kokon, senĝenan kokinon k.s.

GONGFU-TEO DE ĈINIO

Teo estas la plej populara trinkaĵo en Ĉinio, kaj te-ceremonio furoras inter la popolo. Sed por komplete gustumi teon, oni bezonas longan tempon, tial oni nomas tian te-ceremonion "Gongfu-teo" (gongfu en ĉi tiu kazo signifas "temporaba").

La trinkilaro konsistas el 9 pecoj, inter kiuj troviĝas 3 malgrandaj porcelanaj tasoj, fajenca tekruĉo produktita en

Yixing (urbo de fajencaĵoj en Jiangsu-provinco, Ĉinio), karboforneto kaj akvokruĉo. Kial nur 3 tasoj? Ĉar oni ŝatas havi "du kompanojn en tetrinkado, tri kompanojn en drinkado kaj unu kompanon en ekskurso", nome por ĝuado de teo la plej taŭga nombro de kuntrinkantoj estas tri. La kapacito de la tekruĉo estas tre malgranda, ĉar la kruĉo estas iom pli granda ol juglando. La apenaŭa kvanto da teo estas tre taŭga por precize koni la koloron, guston kaj odoron de la teo. Ju pli varma estas la akvo, des pli bona la gusto. Kiam la trinkantoj apenaŭ englutis la teon kaj ekkonis la guston, boliĝis dua kruĉo da akvo. Kvalito de lignokarbo, unu el la 9 pecoj de la trinkilaro, estas tre grava por la gusto de la teo. Oni kredas, ke la temperaturo de lignokarba fajro estas taŭga por te-ceremonio. Kaj kompreneble kvalito de la tekruĉo influas la guston, odoron kaj koloron de la infuzita teo.

Trinkado de Gongfu-teo havas tradician manieron. Kiam oni verŝas bolantan akvon en tekruĉon, oni devas alte teni la akvokruĉon kaj verŝi akvon cirkle laŭ la aperturo de la tekruĉo, por ke ĉiuj tefolioj en la tekruĉo povu samtempe ricevi la varmon de la bolanta akvo. Kiam oni verŝas teon en tasojn, oni devas teni malalte la kruĉon kaj fini la verŝadon en mallonga tempo. Oni ne devas plenigi la tasojn unu post alia, sed devas verŝi malmulte kaj plurfoje laŭvice en la tri tasetojn. Infuzante teon, oni neniel devas estigi ŝaŭmon en la tasetoj. Oni ne devas eltrinki la tason, sed devas restigi iom da teo en la taso por esprimi ĝentilecon. Tian manieron de tetrinkado praktikas ankaŭ ĉinaj



En tetrinkejo

Foto de ZHAO XI

elmigrintoj en landoj de Sud-orienta Azio.

KVAR PLEJ MALJUNAJ UMEARBOJ DE ĈINIO

Ĉinio estas origina loko de umeo kaj la plej maljuna umearbo troviĝas en la antikva templo Jiangxin en Huangmei-gubernio de Hubei-provinco. La umearbo estis plantita en Jin-dinastio (265-420). Ĝi havas malhele grizan ŝelon pro la granda aĝo, sed ĝi floras en vintro kaj printempo.

La dua maljuna umearbo kun aĝo de 1 300 jaroj kreskas en Guoqing-templo en Tiantai-gubernio de Zhejiang-provinco. Malgraŭ la granda aĝo, ĝi havas densan junan branĉaron kaj floras prospere. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi donis milojn da fruktoj. Dum sia florado ĝi ĉiam altiras al si multe da vizitantoj en- kaj eksterlandaj.

La aliaj du kreskas en turisma urbo Hangzhou, ĉefurbo de Zhejiang-provinco. La unua estis plantita en Tang-dinastio (618-907). Ĝi havas ombrelforman kronon kaj ĝia densa floraro donas tre agrablan odoron kaj de malproksime oni povas flari la parfumon. La dua aĝas pli ol 800 jarojn, kaj la floro havas 6 petalojn (floro de ordinara specio de umeo havas nur 5 petalojn). Tiu arbo floras prospere kaj ĉiujare donas 70 kilogramojn da fruktoj sukoplenaj. La vivipovo de umearbo estas admirinda.

Interesaj fenomenoj en ĉinaj dialektoj

En la regiono de la Wu-a dialekto la vorto "da" (lavi) prononciĝas kiel la vorto "bati" en la norda dialekto; Alilokano, kiu ne komprenas tiun dialekton, miras, kial la barbiro volas bati lian kapon post har-tondado

de ZHANG QICHENG

KIOM da dialektoj en la ĉina lingvo? Al tiu demando verŝajne neniu povas doni definitivan respondon per precizaj ciferoj. Iuj asertas, ke sep, kaj aliaj diras, ke tiu nombro devas esti ok. Laŭ mi, la lasta aserto pli kongruas al la realo, ĉar la antaŭa ne distingas la Sud-Fujian-an dialekton de la Nord-Fujian-a, sed fakte ili estas malsamaj dialektoj. Do, troviĝas ok potencaj dialektoj, t.e. la Norda, la Wu-a, la Hunan-a, la Jiangxi-a, la Guangdong-a, la Nord-Fujian-a, la Sud-Fujian-a kaj la Kejia-a. Pri la regionoj kovritaj de tiuj dialektoj s-ro Wang Hanping jam klarigis en sia artikolo "Iom pri ĉinaj dialektoj", aperigita en la 4-a numero de EPC, 1998, mi do ne pritraktos. Tamen pri la dialektoj Kejia-a kaj Wu-a necesas doni klarigojn. Tra la tuta Ĉinio ne troviĝas regiono nomata Kejia, kial do oni tiel nomas tiun dialekton? En la ĉina lingvo "ke" signifas gaston kaj "jia" familion, do "Kejia" havas la sencon "gasto-familioj" (simile, ankaŭ estas la esprimo "gasto-laboristoj" en eŭropaj lingvoj). Pro tio, ke tiuj familioj ne estas indiĝenaj, sed transloĝiĝis el la norda parto de Ĉinio kaj dise loĝas en sudaj provincoj, la

Kejia-a dialekto ankoraŭ enhavas iujn elementojn de la norda dialekto. La Wu-a dialekto estas tiel nomata pro tio, ke la regiono de tiu dialekto, nome, sufiĉe grandaj partoj de Jiangsu- kaj Zhejiang-provincoj estis la teritorio de la antikva regno Wu (585-476 a.K.) kaj dum la periodo de Tri Regno (222-280) ankaŭ unu el ili, kiu okupis tiun regionon, nomiĝis Wu. La dialekto de Ŝanhajo, la plej

tieaj ĉindevenaj loĝantoj multnombre elmigris el suda Fujian. Dume, la Guangdong-a dialekto estas parolata de la ĉindevenaj loĝantoj en Usono, ĉar iliaj prapatroj devenis ĉefe de la provinco Guangdong.

La diferenco inter diversaj dialektoj kelkfoje kaŭzas miskomprenon. Ekz., en la regiono de la Wu-a dialekto la vorto "xi" (lavi) prononciĝas same kiel "si" (morti), do la loĝantoj de tiu regiono evitas "xi" kaj anstataŭigas ĝin per sia dialekta vorto "da", sed la prononco de tiu "da" tute similas al la vorto "da" (bati) en la norda dialekto. Sekve, kiam tiu, kiu ne komprenas la Wu-an dialekton, sciiĝas ke la barbiro "da"-os (lavos) lian kapon, ege miras, kial la barbiro volas bati lian kapon post har-tondado.

Estas feliĉe, ke jam antikve la ĉinaj ideogramoj estis

skribe tute samaj kaj signife kompreneblaj por la tutlanda loĝantaro, kaj tio multe malpliigis la malfacilecon de interkompreniĝo pro la diversaj dialektoj. Kaj nuntempe oni grandskale popularigas la komunan ĉinan parolan lingvon, kiu baziĝas sur la norda dialekto.



Zhang Qicheng (meze)

granda urbo de Ĉinio, estas parto de tiu potenca dialekto. La Sud-Fujian-a dialekto estas pli populara ol la Nord-Fujian-a. Ĝi estas parolata ne nur en la suda parto de Fujian-provinco, sed ankaŭ en Taiwan-provinco, kaj eĉ en Singapuro kaj aliaj sudorientaziaj landoj, ĉar la

Ĝi estas instruata en la elementaj lernejoj kaj uzata en radio kaj televido, sekve ĝi pli kaj pli disvastiĝas. Tamen la diversaj dialektoj kun historio de pli ol mil jaroj ne estas facile forigeblaj. Ekz., la loĝantoj de Hongkong ĝenerale parolas la Guangdong-an dialekton, kaj post la reveno de tiu havenurbo al la patrolando ili deziras lerni la komunan ĉinan parolan lingvon, sed por ili tio ne estas facila. Ankaŭ la loĝantoj de Makao plejparte parolas la Guangdong-an dialekton, kaj post la reveno de tiu loko al la patrolando ili havas la saman problemon.

Ĉirkaŭ la 16-a jarcento pli kaj pli oftigis la kontakto inter okcidentaj landoj kaj Ĉinio, sekve kelkaj vortoj el la ĉinaj dialektoj estis enkondukitaj en eŭropajn lingvojn. El ili la tipa ekzemplo estas la vorto "te", kiu devenas de la Sud-Fujian-a dialekto. Teo estas origine produktita en Ĉinio kaj ĝi estas nomata "cha" en la ĉina lingvo laŭ la prononco de la vaste uzata norda dialekto. Sed la homoj el Eŭropo, kiu antikve ne havis tiun planton kaj sekve ne havis nomon por ĝi, enkondukis la vorton "te" en sian lingvon, ekz., la franca vorto "the" kaj la angla "tea". Ili miskomprenis, ke ili enkondukis tiun vorton el la ĝenerale parolata ĉina lingvo, sed fakte ĝi estas nur vorto el la Sud-Fujian-a dialekto. En la rusan lingvon oni enkondukis la vorton "chai" anstataŭ "te", eble la rusoj prunteprenis tiun vorton jam en la antikva periodo el sia najbaro "Khitan", antikva etno kaj regno (916-1125), kiu situas en la nordorienta parto de Ĉinio.

Mi supozas, ke probable ankaŭ en la aliaj naŭ slavaj lingvoj oni aplikas tiun rusan vorton "chai". Ankaŭ en la japana lingvo la vorto por teo estas "cha". Tio montras, ke la

japanoj enkondukis tiun vorton el la ĝenerale parolata ĉina lingvo. Kiam nia majstro Zamenhof kreis sian artefaritan lingvon, li ne prenis la rusan vorton "chai", sed la okcidenteŭropan vorton "te", sekve ni havas la vorton "teo" en Esperanto. Lastatempe, okaze de la reveno de Makao al la patrolando, mi informigis, ke la portugala lingvo, malsame kiel aliaj okcidentaj lingvoj, enkondukis "cha" anstataŭ "te". Probable, la portugaloj lernis tiun vorton de makaanoj, ĉar la makaanoj ĝenerale parolas la Guangdong-an dialekton, kaj en tiu dialekto oni ne uzas "te", sed anstataŭe "cha".

Antaŭ ol la populariĝo de la komuna ĉina parola lingvo en la lando, iuj fremdlingvaj vortoj estis ofte enkondukitaj en la ĉinan laŭ la prononco de dialektoj, kaj el tio aperis tre interesaj lingvaj fenomenoj. Jen kelkaj ekzemploj: La markolo Malaka inter la Malaja Duoninsulo kaj la insulo Sumatro estas ĉinigita kiel "Malakka" laŭ la prononco de la Sud-Fujian-a dialekto fare de la elmigrintaj ĉinoj, kiuj devenis de la suda parto de Fujian-provinco. La tradukita nomo ja tre similas al la origina. Sed kiam tiu tradukita nomo estas skribita en ĉinaj ideogramoj, ĝi legiĝas kiel "Maliujia", kiu multe diferencas de la origina. Ĉar la tradukita nomo "Maliujia" jam fariĝis fiksitaj geografia nomo en la ĉina lingvo, oni jam ne povas ĝin ĝustigi. Sekve, la markolo Malaka fariĝis markolo Maliujia en la ĉina lingvo. Se iu ĉino uzas la originan nomon Malaka en sia parolo aŭ sikribaĵo, aliaj ne komprenas kaj miras: "Kie estas Malaka?" Ili konsideras, ke la nomo estas misprononcata, ĉar eĉ sur la mapo indikita per ĉinaj ideogramoj oni nur trovas la nomon "Maliujia" kaj ne

"Malaka".

La angla vorto "sofa" (sofo) estis tradukita de ŝanhajano laŭ la prononco de la Wu-a dialekto kiel "shafa", ĉar en la Wu-a dialekto la ĉina ideogramo "sha" estas prononcata kiel "so", do oni povas diri, ke tiu vorto estis ĝuste tradukita. Sed en la komuna ĉina parola lingvo ĝi fariĝas "shafa" kaj multe diferencas de la angla. Tamen "shafa" jam populariĝis kaj fiksigis en la ĉina lingvo.

En la Guangdong-a dialekto troviĝas kelkaj vortoj enkondukitaj el la angla, ekz., "bashi" (aŭtobuso) laŭ la angla "bus"; "dishi" (taksio) laŭ la angla "taxi"; "xu" laŭ la angla "shirt" (ĉemizo) k.c. Tiuj angladevenaj vortoj estas nun pli-malpli aplikataj en la komuna ĉina parola lingvo.

Aliflanke, iuj fremdlingvaj nomoj, korekte tradukitaj laŭ la komuna ĉina parola lingvo, fariĝas tute diferencaj kaj nekompreneblaj, kiam oni prononcas ilin en la dialektoj. Ekz., la nomo "Marx" estas ĉinigita kiel "Makesi", sed en la buŝoj de ŝanhajanoj ĝi fariĝas "Moks", kaj la germana mono "mark" fariĝas "mok", ĉar la ideogramo "ma" estas prononcata kiel "mo" en la Wu-a dialekto. La multe pli interesa ekzemplo estas: la nomo de la eminenta brita politikisto Churchill estas ĉinigita per tri ĉinaj ideogramoj "Qiu-ji-er". Ĝi estas sufiĉe ekzakte tradukita laŭ la prononco de la komuna ĉina parola lingvo. Sed kiam tiuj tri ideogramoj legiĝas en la Guangdong-a dialekto, "Qiu-ji-er" fariĝas "Oŭ-ge-yi", do la forpasinta brita ĉefministro Churchill estis devigita posedi tiun strangan nomon en la Guangdong-a dialekto. Lia ĉefministra moŝto eble multe interesiĝus, se li estus informita pri tio. ■

Lotus-lanterno

Temas pri mito kiel Chenxiang savis sian patrinon.

Diino Sanshengmu enamiĝis al Liu Yanchang, klerulo en la surtera mondo. Ŝia frato, dio Erlang, firme tion malaprobis. Ŝi senhezite descendis al la homa mondo por ĝui feliĉan vivon. Dio Erlang venis kapti ŝin, sed li retiriĝis antaŭ la magia forto de la lotus-lanterno de Sanshengmu. La lanterno estas magia kaj povas venki la fiulojn kaj doni feliĉon al la bonkoruloj.

Poste Liu Yanchang mortis kaj Sanshengmu sola flegis la filon Chenxiang.

Foje Chenxiang senatente tuŝis la lotus-lanternon, kaj ĝi ekbrilis. Dio Erlang vidis la ekbrilon kaj forŝteligis Chenxiang.

Diino Sanshengmu iris al dio Erlang por repreni de li sian filon. Sed Erlang rifuzis redoni la infanon kaj forrabis la lanternon. Krome li metis Sanshengmu sub Huashan-monton.

Chenxiang en la ĉiela palaco volis savi sian patrinon kaj la tera dio diris al li, ke li sin turnu al simioreĝo Sun Wukong. Dank' al helpo de simieto Chenxiang reakiris la lotus-lanternon

kaj serĉadis Sun Wukong en la surtera mondo. Post kelke da jaroj elkreskis Chenxiang. Iom post iom li komprenis, ke oni devas fari ĉion per si mem. Sun Wukong donacis al li blankan ĉevalon kaj diris, ke la magia hakilo povos helpi lin savi la patrinon.

En la brilo de la lotus-lanterno, Chenxiang kuraĝe batalis kontraŭ dio Erlang. Fine li trahakis la monton kaj savis sian patrinon.

La bildlibro estis adaptaĵo de movbilda filmo kun la sama titolo. Simplaj tekstoj por la belaj bildoj estas facile legeblaj.

112 p. 165X225 mm.
Prezo: 8.00 USD
Sendokosto: 3.00 USD
Mendu ĉe:

- Distribua Fako de EPC
- Libroservo de UEA
- Nia peranto en via lando



Kontribuaĵoj petataj por la konkurso “50 jaroj por EPC”

50 jaroj por

Esperanto

Paco

Ĉinio

En majo 2000 la redakcio de “El Popola Ĉinio” festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo EPC, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson “50 jaroj por EPC” kaj sincere petas vian kontribuaĵon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPC — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPC...

Viaj kontribuaĵoj povas esti en ajna stilo kaj ajna formo. Estas tre bonvenaj koncernaj

fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuaĵoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPC. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuaĵojn en la rubriko “50 jaroj — EPC”. La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPC 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La Red.



Unuiĝo de ĉinaj nacioj

中华人民共和国成立五十周年 1949-1999
民族大团结



Omaĝe al la 50-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la Ĉina Poŝta Administracio emisiis en la 1-a de oktobro 1999 poŝtmarkoserion "Unuiĝo de ĉinaj nacioj".



Lijiang-rivero en nebulo

Foto de WANG LI

ISSN 0032-4361



03>

9 770032 436009

世界语《中国报道》二〇〇〇年第三期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2